


# EL POPOLA CINIO

中國報道

8

1974






Riça Rikolto de Sorgo (cinstila penrajo de CAŬ VEN)



Angulo de Dagang-  
petrolkampo



**Dagang-petrolkampo**

**en Konstruado**



Laboristoj de la 3227-putobora grupo







Instalado de oletuboj per maŝinoj projektitaj kaj fabrikitaj de Dagang-aj laboristoj mem

Intensa firmigado de putomuro.



Instalo de flumetro

Maljuna laboristo Vang Ŝun (la dua de maldekstre), labor-modelo de Daking-petrolkampo, sukcesis kune kun aliaj en teknika renovigo de bormaŝino post sia alveno al Dagang.




Gas-mezuristinoj de la petrolkampo







Elektra kunveldilo por borstango, projektita kaj fabrikita de la laboristoj mem





Alia linio de oletuboj estas instalita



Ŝarĝi trejnon per nafto



# Nova disvolviĝo de la ekstera komerco de Ĉinio

de Li Kiang, ministro de ekstera komerco de la Ĉina Popola Respubliko


**D**E post la Granda Proleta Kultura Revolucio, precipe post 1971, en kiu komenciĝis la Kvara Kvin-jara Plano por disvolvo de la nacia ekonomio, la ekstera komerco de Ĉinio akiris relative grandan kaj novan disvolviĝon.

Ĝis nun, Ĉinio starigis kun pli ol 150 landoj kaj regionoj komercajn rilatojn kaj kontraktis kun pli ol 50 el ili registarajn komercajn traktatojn aŭ protokolojn. En la lastaj kelkaj jaroj, la ĉina registaro, komercaj organizoj kaj korporacioj sendis multajn delegaciojn kaj grupojn eksterlanden por fari viziton kaj akceptis registarajn kaj popolajn komercajn delegaciojn kaj ankaŭ personojn de ekonomia kaj komerca rondoj de multaj landoj. Por lerni unu de alia, interŝanĝi spertojn kaj pli favore disvolvi komercadon la reciprokaj ekspozicioj de ekonomio, komerco kaj industria tekniko aranĝitaj de Ĉinio kaj aliaj landoj estas ĉiam pli oftaj. Kaj krome Ĉinio ofte interŝanĝis studajn grupojn, vizitajn grupojn kaj teknikajn delegaciojn kun la industria kaj scienca rondoj de aliaj landoj por fari diversajn teknikajn aktivadojn.

En la lastaj jaroj la eksporto kaj importado de Ĉinio havis relative grandan kreskon. En 1973, la totala eksporta kaj importa valoro estis 2.5-oblo de tiu de 1965, la jaro antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio. La totala kvanto de eksporto en 1973 kreskis

je 1.5-oblo kompare kun tiu de 1965, dum tiu de importado je 1.45-oblo en la sama periodo.

Kune kun la venka disvolviĝo de socialisma industriigo, okazis rimarkindaj ŝanĝiĝoj al la konsisto de la ĉina importado kaj eksportado. Inter la eksportaĵoj la procentoj de industria kaj mina produktoj kreskis daŭre kaj okupis pli ol 65% de la eksportado en 1973. La de Ĉinio produktitaj kaj eksportitaj ilmaŝinoj, metalaĵoj, mezurinstrumentoj, medicinaj aparatoj, kemiaĵoj, bicikloj, kudromaŝinoj k.a. trovis ŝaton de multaj landoj. La rapide kreskanta petrolo industrio de Ĉinio faris ĝin memsufiĉa en petrolo kaj kun malgrandkvanta superfluaĵo por eksportado. Dum la lastaj jaroj, niaj eksportitaj varoj precipe manĝaĵoj, tekstilaĵoj, metiartaĵoj kaj aliaj malpezindustriaĵoj senĉese kreskas en specoj kaj pliboniĝas en pakado kaj ornamado. Sub la principo de sinapogo sur propraj fortoj, kaj por disvolvi la industrian kaj agrikulturan produktadon kaj ekonomian konstruadon de nia lando, ni daŭre importis kvanton da feraj kaj ne-feraj metaloj, aŭtoj, ŝipoj, aeroplanoj, maŝinoj, kaŭĉuko, kemisterko, insekticidoj, paperpulpoj, ktp. kaj laŭplane aĉetis nombron da kompletaj ekipaĵoj de kemia sterko, de sintezaj fibroj kaj ankaŭ ekipaĵoj por produkto de oksigeno kaj elektro kaj por la minado. Ĉinio importas kvanton da tritiko kaj oleoj, dum eksportas



*La 17-an de junio, 1973, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj intervidiĝis kun la Registara Ekonomia Delegacio de Koreio.*

kvanton da rizo, diversaj grenoj kaj oleoj ĉefe por ŝtopi reciproke mankojn de specoj. Tiu politiko estas tute malsama al tiu de la social-imperiismo kiu pro sia fuŝita agrikulturo aĉetadas grenon ĉie ekster la lando kaj altigas mondmerkatajn prezojn de greno.

Nuntempe, la kapitalisma mondo alfrontas neforskueblan seriozan monan krizon. Kontrastante kun tio, la internaciaj en-kaj el-spezoj de Ĉinio estas ekvilibrataj, la ĉina monbileto stabila kaj *Renminbi* ĝuas bonan internacian krediton. Tio manifestas unu el la superecoj de la ĉina socialisma sistemo.

Sub la direktado de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ Zedong, la ĉina popolo frakasis en la Granda Proleta Kultura Revolucio du burĝajn komandejojn kun Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ kiel la ĉefoj, kontinue praktikas la ĝeneralan linion **streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone**

**kaj ekonomie**, efektivas la principon “**preni agrikulturon kiel la bazon kaj industrion kiel la gvidan faktoron**” kaj serion da politikoj bazitaj sur irado per du piedoj en la konstruado de la lando. Ni praktikas ankaŭ principon de sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj, penluktado kontraŭ malfaciloj kaj ŝparema konstruado de la patrolando kaj gajnis grandajn venkojn unu post alia en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Bone statas niaj industrio, agrikulturo, trafikado, financo kaj komerco. Ĉinio havas ŝtatŝuldon nek eksterlandan nek enlandan. Varprezoj estas stabilaj kaj la merkato prospera. Dume, en la internacia sfero, la ĉina popolo firme praktikas la eksteran politikon ellaboritan de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio kaj reasertitan de ĝia deka kongreso. Ĉinio pluapasaĉe firmigis la revolucian amikecon kaj reciprokan hel-



pon kun frataj socialismaj landoj, kaj reciproke subtenon kaj kunlaboradon kun amikaj landoj. Ĉinio establis diplomatajn rilatojn kun ĉiam pli multaj landoj sur la bazo de la kvin principoj de paca kunezisto. Amikecaj kontaktoj inter nia popolo kaj la popoloj de aliaj landoj fariĝis pli vastaj. Ĉio ĉi tio estas la fundamenta kaŭzo ke Ĉinio havis relative grandan disvolviĝon en ekstera komercado en la lastaj jaroj.

Kiel ĉiuj scias, Ĉinio persistas en la politiko de egaleco, reciproka utilo kaj helpo de unu al alia per bezonaĵoj en komercado kun aliaj landoj. Tio estas politiko determinita de la karaktero de nia socialisma sistemo.


Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, ni tuj abolis ĉiujn privilegiojn de imperiistoj en la malnova Ĉinio kaj kaptis nian nacian ekonomion firme en niaj manoj. Tiamaniere ni ĝisfunde forigis la dependecon de la malnova Ĉinio al imperiismo en ekstera komercado kaj starigis novtipan sendependan kaj suverenecan eksteran komercon servantan al nia socialisma konstruado. Ni opinias, ke politika sendependeco de iu lando estas neapartigebla de ĝia ekonomia sendependeco; post akiro de politika sendependeco, la lando devas aktive klopodi por efektiviĝi ekonomian sendependecon,

alie, la jam akirita politika sendependeco estas ne solida, nek komplekta. Dum la lastaj pli ol dudek jaroj, sub la gvido de Prezidanto Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la ĉina popolo transformis la malnovan kaj postigintan Ĉinion en socialisman landon kun unuapaŝa prospero persistante en la politiko de **sendependeco, memstareco kaj sinapogo sur propraj fortoj** en socialisma konstruado, nome, eliri el la aktualaj kondiĉoj de sia lando, per siaj fortoj kaj saĝo, per internaj akumuloj de monrimedo kaj utiligi enlandajn naturajn riĉfontojn. Ni neniam estis timigitaj de la “blokado kaj embargo” de imperiistoj al nia lando, nek subigitaj de la politika kaj ekonomia premo de la social-imperiismo. Tute kontraŭe, la portempaj malfaciloj altruditaj de ili al ni nur instigis nian popolon al pli rapida konstruo de la socialisma patrolando.

Kompreneble, tute ne signifas la politikon de “sinenfermo”, ke ni persistas en la politiko de **sendependeco, memstareco kaj sinapogo sur propraj fortoj** en konstruado. Frue en 1949, antaŭtage de la fondiĝo de la nova Ĉinio, Prezidanto Maŭ jam montris: “**La ĉina popolo volas konduki amikan kunlaboron kun diverslandaj popoloj de la mondo, restarigi kaj disvolvi la internacian komercon**”

*La ĉina halo de la Internacia Foiro en Kairo*





*Vicêfministro Li Hiannian en la Industria Scienc-teknika Ekspozicio de Francio en Pekino*

**por favorigi la disvolvon de produktado kaj prosperigon de ekonomio.”** Dum la lastaj pli ol dudek jaroj, praktikante tiun instrukcion de Prezidanto Maŭ pri ekstera komerco, Ĉinio laŭplane faris komercadon kun aliaj landoj de la mondo sur la bazo de egaleco kaj reciproka utilo, lernis superecojn de aliaj landoj kaj akiris bezonatajn materialojn, ekipaĵojn kaj teknikojn tra interŝanĝo. Tio estas ankaŭ praktikado de la principo “servigi fremdlandajn al Ĉinio kaj kombini lernadon kun inventado”, por pligrandigi nian forton en sendependa konstruado de socialismo per niaj propraj fortoj, por plirapidigi la paŝojn en la socialisma konstruado. Faktoj pruvis, ke ekstera komerco estas necesa por disvolvi nian nacian ekonomion. Kaj samtempe, per ekstera komerco, ni povas plifortigi reciprokajn subtenon kaj kunlaboron en la ekonomia sfero kun frataj socialismaj landoj kaj amikaj landoj

de la tria mondo, kio utilas al respektiva ekonomia konstruado kaj plifirmigas respektivan ekonomian sendependecon. Per ekstera komerco, ni povas ankaŭ plivastigi ekonomian kaj teknikan interŝanĝon kun pli kaj pli multaj landoj kaj popoloj surbaze de la kvin principoj de paca kunekzisto, kio plifortigos la rilatojn inter Ĉinio kaj aliaj landoj de la mondo kaj pliprofundigos la amikecon inter la ĉina popolo kaj la popoloj de aliaj landoj. Pro tio la ĉina ekstera komerco certe disvolviĝos en firmaj paŝoj laŭ ĝiaj bezono kaj ebleco. La ĉina ekstera komerco estas solida kaj fidinda.

Ĉinio ĉiam opinias, ke landoj, ĉu granda aŭ malgranda, estas egalaj. En la ekstera komerco ni firme persistas en la principoj de egaleco, reciproka utilo kaj helpo de unu al alia per bezonaĵoj, t.e. en komerco respekti alian je la suvereneco kaj volo, atenti pri la ambaŭflankaj bezono kaj ebleco,



por favorigi al la respektiva ekonomia disvolvado. Ni firme oponas kontraŭ la politiko rabi naturajn riĉfontojn de aliaj landoj, superregi ilian nacian ekonomion kaj interveni en iliajn internajn aferojn, antaŭenpuŝita de la du superpotencoj sub la ŝildoj de “komerco” kaj “helpo”.

Laŭ la supre menciitaj principoj de konstruado kaj ekstera komercado, la socialisma Ĉinio kompreneble neniam provos altiri fremdlandan kapitalon aŭ ekspluati siajn aŭ fremdlandajn naturajn riĉfontojn per kunlaboro kun aliaj landoj, kiel faris iu superpotenco sub la nomo de “socialismo”. Ĉinio neniam faros kunan administradon kun alilandoj, kaj neniam humilaĉe almozpetos fremdlandajn pruntojn kiel tiu superpotenco. Ĉinio deziras teknikan interŝanĝon kun aliaj landoj kaj laŭplane kaj elekte importas necesajn ekipaĵojn laŭ la bezonoj de la socialisma konstruado. La pago estas aranĝita tra intertraktado de la du komercantaj flankoj laŭ la kutimoj de internacia komercado.

Laŭ la ekonomio Ĉinio estas lando disvolviĝanta. Ĝi estas postĝinta en multaj kampoj, kun nealtaj niveloj de industrio, agrikulturo, scienco kaj tekniko. Kvankam

la ĉina ekstera komerco havas relative grandan disvolviĝon, tamen nun ĝi ankoraŭ ne povas plene kontentigi la bezonojn de la ĉiam pli kreskanta enlanda produkta konstruado kaj la bezonojn de eksteraj merkatoj. Cetere ekzistas en nia ekstera komerco iaj eraroj kaj mankoj. Rigarde al la estonta disvolviĝo, la latentaj fortoj de la ĉina ekstera komerco estas giganta, pro ke Ĉinio havas vastan teritorion, riĉajn fontojn kaj multajn loĝantojn kaj ĝia socialisma konstruado estas ĉiam leviĝanta. La granda movado de kritiko kontraŭ Lin Biao kaj Konfucio certe akcelos la pluapaŝan disvolviĝon de la ĉina nacia ekonomio, kaj niaj industriaj kaj agrikulturaj produktoj certe plimultiĝos, la kvalito de produktaĵoj certe pliboniĝados, kun ĉiam pli riĉaj specoj kaj ĉiam pli boniĝantaj pakado kaj ornamado, tiel ke, ni povas iom post iom eksporti pli multajn kaj pli bonajn varojn por adaptiĝi al la bezonoj de diverslandaj popoloj kaj samtempe la ĉinaj importoj certe kreskos akorde. Sendube, la perspektivo de nia komerco kun aliaj landoj de la mondo fariĝos pli kaj pli vasta.

(Tradukita el *Ĉina Ekstera Komerco* N-ro 1, 1974.)

*La Ĉina Ekonomia kaj Komerca Ekspozicio inaŭguriĝis en majo, 1973, en Meksiko.*





# Pri la Foiro de Ĉinaj Eksportaj Varoj en printempo 1974

**L**A nove konstruita domo de la Foiro de Ĉinaj Eksportaj Varoj staras apud Liuhua-lago en Kantono. Ĉirkaŭ ĝi flirtis diverskoloraj flagoj kaj prosperis freŝe verdaj arboj kun densaj folioj. Du gigantaj sloganoj elstaris super la supro de la domo: “Venke marŝu laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ” kaj “Vivu la granda unuiĝo de la popoloj de la tuta mondo”. En la domo freŝe impresis la bonorde aranĝitaj ekspoziciaĵoj. Tie okazis la Foiro de Ĉinaj Eksportaj Varoj en printempo 1974.

La foiro havis lokon ĉi-printempe en la nova domo, kun riĉa enhavo kaj nova fizionomio. Ĝi montris al la komercistaj rondoj de la tuta mondo, elmigrantaj ĉinoj kaj samlandanoj en Hongkongo kaj Aŭmen la bonan situacion de nia lando, ke sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ Zedong la diversnacieca popolo kompakte unuiĝas kun alta batalspirito kaj profunde disvolvas la movadon de kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio; la brilan scenon de prospereco ke la ĉina popolo antaŭenpuŝas la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ pri sendependeco kaj memdecidemo, sinapogo sur la propraj fortoj, penluktado

kontraŭ malfaciloj kaj konstruado de la lando en diligenteco kaj ŝparemo.

## **NOVAJ FRUKTOJ DE SINAPOGO SUR LA PROPRAJ FORTOJ**

Kvarono de la pli ol 40,000 specoj da varoj ekspozitaj en la foiro estis novaj produktaĵoj, kiujn oni ne trovis en la foiro aŭtune de 1973. Tio estas nova atingo de nia socialisma konstruado, sub la gvido de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kaj frukto de la Granda Proleta Kultura Revolucio.

Daking kaj Daĝaj estas du flagoj sur niaj industria kaj agrikultura frontoj. Iliaj heroaj faroj estis montrataj ambaŭflanke en la vestibla halo de la foira domo. Post hardado en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la movado de kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio, la du ruĝaj flagoj fariĝis pli brilaj. La produktokvanto de la malnova petrolkampo delongtempe restas stabile alta sub la atentema zorgado de la Dakingaj laboristoj; ankaŭ la ekspluato de novaj petrolkampoj, fundamenta konstruado kaj sinteza utiligo en petrolkemia industrio mul-

te disvolviĝis. La nuna produktokvanto de Daking egalas al kvinoblo de tiu en la estinteco. La kadroj kaj komunumanoj de Daĝaj-brigado formis kampojn per niveligo de montoj kaj fosaĵoj, aktive efektivigis mekanikigon kaj irigacion de agrikulturo kaj vaste aplikis sciencajn metodojn en terkulturado, dank' al kio ĝia totala produktokvanto de greno en 1973 kreis novan rekordon en la historio. Multaj eksterlandaj gastoj diris post rigardo al la modelo de Daĝaj: "La grandaj atingoj de nur pli ol 400 Daĝaj-anoj ja pruvis la veron ke 'homa volo, ne naturo, decidas'."


En ĉiuj frontoj de nia nacia ekonomio oni akiris novajn sukcesojn kaj aperis multaj novaj avangardaj unuoj, sub la grandaj alvokoj de Prezidanto Maŭ "**lerni de Daking en industrio**" kaj "**lerni de Daĝaj en agrikulturo**". En la halo de metalurgio oni povis vidi la modelon de mekanika laborlinio de horizontala antaŭenfosado, kiu spegulis ke niaj minejaj laboristoj kaj oficistoj eltrovis novan vojon por mekanikigi mezgrandajn kaj malgrandajn minejojn dank' al ripeta praktikado kaj kuraĝa navigado. 90% de la ekspoziciata grandkvanta, vari-speca teksaĵo estas novaj. En metiarta halo estis multaj metiartaĵoj kun socialismaj novaĵoj kiel temo, kiuj spegulis la spiritan fizionomion de nia lando en la socialisma

epoko. En la halo de mekanikaĵoj troviĝis diversaj ilmaŝinoj, tekstilaj maŝinoj, maŝinoj por aliaj malpezindustrioj, trafiko, konstruado kaj minekspluatado, elektro-motoraj ekipaĵoj, agrikulturaj maŝinoj kaj maŝinoj por prilabori agrikulturajn produktaĵojn, fabrikitaj ne nur de grandaj urboj kaj grandaj fabrikoj, sed ankaŭ de mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj en malgrandaj urboj kaj kamparo. Tio plene montris la gigantan potencon de principo de Prezidanto Maŭ "**rompi fremdlandajn rutinajn regularojn kaj iri nian propran vojon por disvolvi industrion**".

La elektronika industrio de Ĉangĝoŭ, unuafoje ekspoziciata, estis unu el centoj da avangardaj tipoj emerĝintaj en la movado "lerni de Daking en industrio". La elektronika gravurmaŝino de desegnoj sur cilindro por presi teksaĵojn, kiun la vastaj amasoj de laboristoj kaj oficistoj de la elektronika industrio en Ĉangĝoŭ sukcesis fabrikii, altigis la laborefikon pli ol ok-oble kompare kun tiu de man-gravurado en la pasinteco. La teksaĵoj presitaj per cilindroj gravuritaj per la nomita maŝino havas klaran tonvariadon kaj brilecon en koloroj.

En la halo "lerni de Daĝaj en agrikulturo" forte impresis la ekspoziciaĵoj pri la heroaj faroj de Bajjinŝile-brigado de Sizivang-a Flago en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. La nomita brigado situas en la

*Fremdlanda komercisto rigardas specimeno de malalta-karbona ŝtalo.*





alta kaj malvarma Ulanĉap-stepo, kie akre mankas akvo. En la movado “lerni de Daĝaj en agrikulturo” la vasta mongola kaj han-a paŝtistaro disvolvis en unuiĝo la revolucionan spiriton ke “homa volo, ne naturo, decidas” por konstrui novan stepon, prenante Daĝaj kiel modelon. La ekspoziciaĵoj en diversaj formoj vivece prezentis la brilajn ŝanĝojn, kiujn la brigado atingis sub la kuraĝigo de la spirito de Daĝaj.


La sukcesoj atingitaj de la avangardaj unuoj sur la industria kaj agrikultura frontoj kaj la agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj devenantaj de diversaj lokoj de la lando kaj la aliaj ekspoziciaĵoj ne nur liveras riĉan materian bazon por nia eksporta komerco, sed ankaŭ prezentis la bildon de prospero kiun atingis nia diversnacieca popolo en konstruado de la socialisma patrolando, sinapogante sur la propraj fortoj laŭ la ĝenerala principo de disvolvo de la nacia ekonomio **“preni agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel la gvidan faktoron”**.

## SUB LA GVIDO DE LA REVOLUCIA LINIO

Sur la fundo de la halo de verkoj de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto

Maŭ okulfrapis la skribita eldiro de Prezidanto Maŭ: **“Serioze legi kaj studi por primajstri Marksismon”**. Sur naŭ longaj tabloj estis montrataj la *Elektitaj Verkoj de Marks kaj Engels* en sep lingvoj, verkoj de Lenin kaj Stalin en 14 lingvoj kaj *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* en 37 lingvoj kaj multaj broŝuroj de liaj unuopaj verkoj. Estis montrataj ankaŭ du grandaj fotoj de la du ĉefartikoloj de la ĵurnalo *Renmin Ribao*: “Konduki ĝisfine la batalon de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio”, “Kritiko pri ‘sinrego por restarigi la etikedon’” kaj la fotoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en studo de verkoj de Marks, Lenin kaj Prezidanto Maŭ kaj en kunveno por kritiki Lin Biaŭ kaj Konfucion, ĉio kio montras ke la centmiliono amaso de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj sur la diversaj frontoj de la lando aktive sekvas la alvokon de Prezidanto Maŭ pri serioza studo de Marksismo kaj kritiko kontraŭ reviziismo, profunde disvolvas la batalon de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio por firmigi kaj disvolvi la grandajn fruktojn de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj venke antaŭenpuŝi la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon.

*Instrumenta centrorega instalaĵo de la malgranda vapor-turbina generatoro-kompleto, unuafoje ekspoziciata en la foiro*





Kiam Marksismo, Leninismo kaj Maŭzedongpenso estas posedataj de la vastaj revoluciaj popolamasoj, ili tuj produktas gigantan forton por konstrui la socialismon. Tiu vero estis vivece pruvata de la ekspoziciaj heroaj faroj de la Dalian-a Fabriko de Lokomotivoj kaj Vagonoj.

Tiu fabriko havas historion de sepdek jaroj. Antaŭ la Liberiĝo ĝi povis nur ripari vapor-lokomotivojn kaj vagonojn. Sed, sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ĝi rapide disvolviĝis en fabrikon kapablan pogrande produkti dizel-lokomotivojn kaj vagonojn. Ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio la fabriko prenis la bazan linion de la Partio kiel orientilon por profunde disvolvi la amasan movadon "lerni de Daking en industrio" kaj atingis novajn sukcesojn. En la jaro 1970 ili reformis la vagon-produktan sistemon kaj triobligis la produktpovon; kaj en 1971 ĝia produktpovo plue pliiĝis per kvindek procentoj dank' al reformado de produkta sistemo de varma traktado. Por konstrui dizel-lokomotivojn de modelo "Dong Feng 4" tiu fabriko intense reformis la produkton de lokomotivoj, efektiviĝis ĝis nun de la jaro 1972 sume 35 produktajn liniojn, inkluzive miksajn kaj aŭtomatajn, pli ol 8,300 teknikajn renovigojn, memproduktis 880 novajn kaj reformis pli ol 350 malnovajn ekipaĵojn. Dank' al tio la fabriko sukcesis en provfabrikado de la dizel-lokomotivo kaj per tio faris novan kontribuon al la fervoja transporto de la patrolando.

## HISTORIA FLUO NEHALTIGEBLA

Kun la vigla disvolviĝo de la nacia ekonomio, senĉese disvastiĝas niaj eksteraj ekonomiaj rilatoj. En la jaro 1973 nia lando plie disvolvis la komercajn rilatojn kun la socialismaj landoj Koreio, Vjetnamio, Albanio kaj Rumanio kaj ankaŭ plimultiĝis tiuj kun la landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko.



*Gastoj pririgardas la modelon de Bajjinhile-bri-gado de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, tipo de lerno de Daĝaj en agrikulturo.*

La nombro de gastoj kiuj vizitis ĉi-prin-tempan foiron superis tiun de ĉiu pasinta. La komercaj delegacioj de la landoj de la tria mondo, la reprezentantoj de la komercaj ĉambroj kaj komercistaj organizoj de aliaj landoj kaj regionoj, elmigrantaj ĉinoj kaj samlandanoj en Hongkongo kaj Aŭmen kolektiĝis en la foiro por rigardi la ekspoziciaĵojn, fari negocojn kaj kore interŝanĝi sentojn de amikeco.

Multaj el la fremdlandaj gastoj varme laŭdis ke la foiro strikte kunligis la popolojn de multaj landoj. Post sia vizito al la foiro, iu libana amiko diris kun profunda impresio: "Vere grandaj estas la atingoj akiritaj de la ĉina popolo. La kaŭzo de la opono de imperiismo kaj social-imperiismo kontraŭ Ĉinio kuŝas en tio, ke ili timas ke la lasta firme subtenas malgrandajn landojn kaj la trian mondon." "La ĉina popolo materie kaj morale subtenas la batalon de la arabaj popoloj, precipe la batalon de la palestina popolo por sia nacia liberiĝo." Iu perua gasto, kiu jam subskri-

bis 11 komercajn kontraktojn en la foiro, diris: “Peruo kaj Ĉinio ambaŭ apartenas al la tria mondo. Ni tre ĝojas komerci kun Ĉinio, ĉar la komerco estas farita por ambaŭ flankoj tute sur la bazo de egaleco.” Parolante pri la rabemaj agadoj de la superpotencoj, li diris: “Ili faras al ni premojn en ĉiuj flankoj por akiri niajn krudmaterialojn kontraŭ malalta prezo. Tia komercado tre malutilas al niaj nacia ekonomio kaj ekstera komerco.” Tiuj eldiroj de eksterlandaj amikoj esprimis la komunan deziron de la landoj kaj popoloj de la tria mondo plifortigi la unuiĝon kaj reciprokan subtenon por kune oponi kontraŭ la superrego, ekspluato kaj prirabado fare de la superpotencoj.

Sur la bazo de la eksterkomercaj principoj de egaleco, reciproka utilo, interhelpo per bezonaĵoj, pri kiuj nia registaro ĉiam insistas, la foiro aktive disvolvis teknikan interŝanĝon kaj komercajn rilatojn kun la landoj de la tria mondo. En ĉi-foja foiro

estis montrataj industriaj produktaĵoj kaj kompletoj de ekipaĵoj, kiuj taŭgis por la bezonoj de landoj evoluantaj. En la haloj de mekanikaĵoj, metaloj kaj minaĵoj oni povis vidi maŝinojn por prilabori grenojn kaj oledonajn semojn, malgrandajn agrikulturilojn, ordinarajn ilmaŝinojn, mantraktorojn, riztransplantojn, meteorologiajn radarojn, ŝtalajn kaj metalajn materialojn. Tiuj ekspoziciaĵoj tre plaĉis al la komercaj rondoj de la evoluantaj landoj kaj regionoj. Iu amiko el Mezoriento diris: “Ĉi-foje la specoj de varoj estas pli multaj, kaj iliaj formoj pli bonaj, kiuj tre konformas al niaj bezonoj.”

La foiro okazigita ĉe Liuhua-lago multe helpis al disvolvado de niaj komercaj rilatoj kun diversaj landoj kaj regionoj de la mondo, pluapaŝe akcelis interkomprenon kaj amikecon inter la ĉina popolo kaj popoloj de diversaj landoj en la mondo, kaj fortigis nian batalan unuiĝon kun landoj de la tria mondo.

## Enciklopedieto


# La Foiro de Ĉinaj Eksportaj Varoj en Kantono

En printempo kaj aŭtuno ĉiujare, la Foiro de Ĉinaj Eksportaj Varoj estas okazigita en Kantono de la kompanioj por ekstera komerco de nia lando. Ekde printempo de 1957 ĝis tiu de 1974, la foiro okazis jam 35 fojojn.

En la pasintaj 17 jaroj, kun vigla disvolviĝo de la socialisma konstruado kaj vastiĝo de la internaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj aliaj landoj, skalo de la foiro pli kaj pli grandiĝis kaj la gastoj pli kaj pli multiĝis. La specoj de eksportaj specimenoj kaj ekspoziciaĵoj, kiuj spegulas la novajn atingojn de ekonomia konstruado de nia lando, montritaj en la foiro, pliiĝis de pli ol 12,000 en la komenco de la foiro ĝis pli ol 40,000 ĉi-foje. Ĝia ekspozicia areo en printempo de 1957 estis nur 12,000 kvadrataj metroj, sed tiu en aŭtuno de 1959 pli ol 47,000 kvadrataj metroj. En printempo de 1974 la foiro

estis translokita al la nove konstruita ekspoziciejo kun areo de 110,000 kvadrataj metroj. Al la unua foiro venis pli ol 12,000 gastoj el pli ol 20 landoj kaj regionoj, sed printempe de 1974, la foiro havis jam pli ol 25,000 gastojn el pli ol 100 landoj kaj regionoj. La nombro kaj totala valoro de importaj kaj eksportaj transakcioj fiksitaj en la foiro multe grandiĝis. Samtempe, la strukturo de ĉinaj eksportaj varoj havis relative grandan ŝanĝiĝon. Multaj varoj, kiujn antaŭe ni ne povis produkti, nun estas ne nur produktataj, sed ankaŭ eksportataj.

La Foiro de Ĉinaj Eksportaj Varoj jam fariĝis unu el la influaj foiroj en la mondo kaj ankaŭ grava kanalo por disvolvi amikajn kontaktojn inter la popoloj kaj la ekonomiaj kaj komercaj rondoj de Ĉinio kaj aliaj landoj.



# Hingang — komerca haveno de amikeco

**L**A haveno Hingang sidas ĉe la enfluejo de la rivero Hajhe kaj estas gorgo de norda Ĉinio al mara trafiko. Ĝi distancas 160 kilometrojn fore de Pekino kaj havas la nomon de “surmara pordego” de la ĉefurbo. Ekde la urbocentro de Tiangin, oni atingos Hingang post unuhora aŭtoveturado orienten.

## KOMERCO KUN KVIN KONTINENTOJ

Hingang estas unu el la gravaj havenoj de nia lando por ekstera komercado, kaj ankaŭ haveno por amika interkontaktado de nia popolo kun alilandaj popoloj.

Laŭ statistiko, la havenon ĉiujare vizitas pli ol 1,000 ŝipoj/fojoj venantaj de pli ol 90 landoj kaj regionoj de la mondo. En 1973, la haveno akceptis fremdlandajn maristojn pli ol 50,000 homojn/fojojn. Tiu nombro estis la plej granda en la historio. Cetere ankaŭ fremdlandaj vizitantoj surbordiĝas, prenante vojon tra Tiangin al nia lando.

La fremdlandaj maristoj kaj vizitantoj venintaj trans maroj kaj oceanoj ĉiam trovis varman akcepton de laboristoj kaj oficistoj de la haveno. Ili ofte kune amuzis sin, pilkoludis kaj faris turismajn


vizitojn. Iuj eĉ laboris kune kun ĉinaj laboristoj, kio profundigis reciprokan amikecon.

En la Marista Klubo de Hingang estas ekspozataj multaj donacaĵoj, memorigaĵoj kaj varmaj leteroj de fremdlandaj maristoj. La plejparton de la donacaĵoj kaj memorigaĵoj konsistigas metiartaĵoj kun nacia stilo de la koncernaj landoj. Inter ili troviĝas argila skulptaĵo el Fukuoka, Japanio, donacita de la japana amiko Nakata. La artaĵo montras figuron de patrino kun filino. En ŝia mano estas gruo el faldita papero. S-ro Nakata diris, ke la gruo simbolas pacon. Li deziras ke la amikeco inter la japana kaj ĉina popoloj daŭru eterne de generacio al generacio.


La ekstera komerco de nia lando sekvas la principojn de egaleco, reciproka utilo kaj interhelpo per provizado de bezonaĵoj. Tio konformas al la komunaj interesoj de la ĉina kaj aliaj popoloj kaj montras la komunan deziron de la ĉina popolo disvolvi la interkompreniĝon kaj amikecon kun la aliaj popoloj.

Laŭ tiuj principoj kun la senĉesa disvolviĝo de la socialisma konstruado de nia lando, la eksportaj kaj importaj varoj de nia lando havas relative grandan





*Aŭtomata transportilo de salo*



*Ŝipo baldaŭ ŝarĝota*

ŝanĝiĝon en strukturo kaj kreskon en kvanto. Tra la haveno, nia lando eksportas krom tradiciaj varoj, kiuj ĝuas bonan famon en la internacia merkato, ekzemple porcelanaĵoj, silkaĵoj, porkharegoj, metiartaĵoj, ercoj k.a., ankaŭ kotonteksaĵon, drapojn, lanajn litkovrilojn, kaŭĉukajn ŝuojn, biciklojn, kudromaŝinojn, ladmanĝaĵojn k.a. malpezindustriaĵojn. Kaj cetere ni povas eksporti ankaŭ tiujn kiujn antaŭe ni ne povis produkti aŭ ĉefe importis,

ekzemple ilmaŝinoj, metalaĵoj, instrumentoj, mezuri-  
loj, kamionoj, tinkturoj, medicinaj instrumentoj  
k.a., el kiuj mezgrandaj kaj malgrandaj ilmaŝinoj  
kaj ĉiutagaj metalaj produktaĵoj estas aparte ŝatataj  
de iuj landoj de la tria mondo. Samtempe kun  
tio, laŭ la bezonoj de niaj industrio, agrikulturo  
kaj ĉiutaga vivo, ni importas kvanton da fera  
metalo, kaŭĉuko, precizaj ilmaŝinoj, kemisterko,  
agrikulturaj insekticidoj kaj iuj modernaj komple-  
taj ekipaĵoj.

## NOVA VIVO DE MALNOVA HAVENO

Hingang, kiel nova haveno de Ĉinio por internacia komerco, estis restarigita, plivastigita kaj ekfunkci-  
gita en 1952. Pro la grava geografia pozicio de  
la haveno kaj la riĉaj fontoj de karbo, fererco, salo,  
kotono, pelto kaj lokaj specialaj produktaĵoj en  
norda Ĉinio, jam en la mezo de la 19-a jarcento  
la haveno komencis esti uzata de imperiistoj kiel  
grava trairejo por fari militan agreson kaj ekonomian  
prirabon al Ĉinio.

La historio notis, ke imperiismaj agresantoj  
plurfoje invadis Ĉinion uzante la lokon kiel sur-  
bordiĝejon. En 1860 la imperiistoj devigis la regis-  
taron de King-dinastio malfermi Tiangin kiel  
komercan havenon, tiel ke ne nur fremdlandaj var-  
ŝipoj, sed ankaŭ iliaj militŝipoj povis libere iri en  
la havenon de Tiangin. De tie la imperiistoj  
rabe forportis grandajn kvantojn da agrikulturaj  
kaj brutobredaj produktaĵoj kaj ercoj el Ĉinio.  
La varoj enportitaj tra ĝi estis malpezaj industriaĵoj  
kaj luksaĵoj. Per tio ili prirabis kaj ekspluatis la  
ĉinan popolon, bati kaj ruinigi la naciajn industriojn  
kaj komercon de Ĉinio.

Tiutempe en la enfluejo de Hajhe, kies bonordo  
ne estis zorgata, sedimentiĝis grandaj kvantoj da  
tero kaj sablo alportitaj de la riverfluo kaj tajdo,  
kaj la naviga vojo fariĝis pli kaj pli malprofunda.  
Malgrandaj barĝoj povis atingi dum fluso la rive-  
rajn havenojn Tangu kaj Tiangin, sed grandaj  
ŝipoj povis nur ankrumi sur la maro, 50 km. dis-  
tance de Tiangin. Imperiistoj devigis grandajn  
nombrojn da ĉinaj kulioj transporti varojn de kaj  
al grandaj ŝipoj per malgrandaj barĝoj. Multaj  
el ili mortis pro malsato, trolaciĝo kaj kruela batado.

Post la Evento de la 7-a de Julio 1937, por inten-  
sigi la militan agreson kaj ekonomian prirabon  
al Ĉinio, la japanaj militaristoj riparigis kaj kons-  
truis la havenon de Hingang, sed post multaj jaroj  
dekmil-tonelaj varŝipoj ankoraŭ devis ankrumi sur  
la maro ekster Tangu por fari en- kaj el-ŝarĝojn.

Cetere, pro manko de magazenoj la varojn oni nur povis stapli subĉiele ambaŭborde de Hajhe.

Post 1945, dum la reakcia regado de Kuomintango, oni eĉ ne povis konservi la ekzistantan staton. La postrestintaj ekipaĵoj kaj materialoj estis ŝtele forvenditaj aŭ fuŝe eluzitaj, tiel ke tiu malgranda haveno preskaŭ fariĝis "morta".

Kun la venko de la revolucio sub gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, Hingang akiris novan vivon. Ĝi revenis en la manojn de la laboranta popolo kaj dokistoj fariĝis ĝiaj mastroj. Ili aktive riparis kaj plivastigis ĝin, kaj komencis per ĝi amikan komercadon kun aliaj landoj, malfermante novan paĝon de ĝia historio.

### KOMENCIĜO DE ENTREPRENO EN MALFACILOJ

La grandskala restarigo kaj plivastigo de la haveno Hingang komenciĝis nelonge post la fondiĝo de la nova Ĉinio. La konstruaj laboroj por la unua etapo estis plenumitaj en malpli ol 2 jaroj de aŭgusto 1951 ĝis la fino de 1952; de tiam, en la malgrandan havenon, kiu origine povis akcepti nur 3,000-tonelajn ŝipojn, unuafoje envenis 10,000-tonelajn varŝipojn. Tio atestis, ke la ĉina laboristaro sub la gvido de Kompartio pene klopodas restarigi kaj disvolvi la nacian ekonomion kiel mastroj de la ŝtato.

Ne estas malfacile imagi, ke multajn malfacilojn devis alfronti kaj grandajn penojn devis fari la laboristoj en dragado kaj konstruado de la haveno. Tiam eĉ tre aĝaj skafandristoj alvenis helpe kaj subakviĝis por elakvigi ŝipojn dronigitajn de Kuomintango en ĝia avakuo post malvenko. Spite de frostoj, la laboristoj elakvigis preskaŭ 200 ŝipojn kaj tiel forigis la obstrukcojn por dragado.

En la daŭro de pli ol unu jaro, ili sukcesis eldragi navigan vojon 52 km. longan kaj 60 m. larĝan, venkinte la ĝenon de tajdo kaj sabloŝlimo. Kaj plie ili konstruis du moleojn la plej longajn en nia lando kaj fosis grandarean profundan havenan basenon. Per la elfosita ŝlimo kaj de montoj alportitaj ŝtonoj kaj tero, ili formis ĉe marbordo bazon por konstrui sur ĝi kajojn kaj staplojn. De tiam ekfunkciis la arta haveno por internacia komerco.

Sed tio estas nur elirpunkto de ĝia nova konstruado. Kun la disvolviĝo de nia ekstera komerco, la konstruado de la haveno fariĝas ĉiam pli grandskala kaj senĉese renoviĝas ĝia fizionomio.

Oni vidas, ke oriente de la malnovaj kajoj estas nove konstruita ĝetkajo, kiu estas ĉe akvo pli profunda ol tiu de la malnovaj kajoj, kun pli granda longeco, povas akcepti kelkdek mil-tonelajn oceanajn varŝipojn.

La nova Ĉinio plejeble plibonigas la laborokondiĉojn de laboristoj kaj altigas laborefikon. La ŝargmaŝinoj de la haveno plimultiĝis de 2-3 en la

*La Delegacio de "Ŝipo por Amikeco inter Japanio kaj Ĉinio" venis de Osaka al Hingang.*





tempo de la Liberiĝo ĝis kelkcent en nunaj tagoj, dank' al kiuj fundamente efektiviĝis mekanikigo de ŝarĝlaboroj. En la haveno grandaj ŝipoj estas ŝarĝataj kaj malŝarĝataj apud la kajoj; gruoj ŝvingadas siajn longajn brakojn; transportaj veturiloj navede kuradas inter la kajoj kaj staploj, kaj plene ŝarĝitaj trajnoj venadas kaj foriradas fajfante.

Ĉe la ĝetkajo kuŝas flosgruo, kies grizarĝenta korpo kun du longaj ŝtalaj brakoj alte leviĝas super la mastoj de varŝipoj. Ĝi estas konstruita de dokistoj per utiligo de malnova cisternobarĝo kaj aliaj uzitaj materialoj en la daŭro de ok monatoj en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Ĝia ĉefa brako povas levi 150 tunojn kaj la helpobrako — 25 tunojn. Antaŭe la haveno ne havis grandan gruan kaj pezaj varoj devis esti elŝarĝitaj en aliaj havenoj. La nuna flosgruo multe faciligis la laboron, kaj ĝia konstrukosto egalas nur al dekono de la prezo por aĉeti unu novan de tia speco.


Dum pli ol 20 jaroj la laboristoj de la haveno daŭre dragis la navigvojojn kaj havenbasenon, riparadis kaj konstruis kajojn kaj staplojn. La spaco de profundaj kajoj plimultiĝis per pli ol

100%, la areo de staploj per 1.4-oblo kaj tiu de subĉiela deponspaco per ĉirkaŭ 4-oblo. La kvanto de eksportaj kaj importaj varoj de 1973 superis dekoblon de tiu de 1950. Tamen la haveno ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonojn de la rapide disvolviĝanta ekstera komerco de nia lando kaj nun la bravaj havenkonstruantoj komencis novan plivastigon de la haveno. Sur la konstruejo ĉie prezentiĝas vigla sceno de intensa konkurado de laboro.

Vidinte la diligentan laboradon de la ĉinaj laboristoj, iu fremdlanda ŝipestro, kiu venis foje al Ĉinio antaŭ la Liberiĝo, demandis mirigite: “Kial al la haveno okazis tiel okulfrapa ŝanĝiĝo?” Li Ĉangfa, vicsekretario de la kompartia komitato de iu laborsekcio de la haveno, kiu estis infandokisto en la malnova Ĉinio, diris trafe: “La socio ŝanĝiĝis, kaj tiel ankaŭ la homoj. Antaŭe ni laboradis kiel ŝarĝbrutoj, sed nun ni estas la mastroj de la haveno, kaj kompreneble ni havas neelĉerpeblan energion!”

Dank' al la senĉesa klopodo de la laboristoj Hingang fariĝos ankoraŭ pli prospera moderna haveno.

### *Flosgruo*





# Ekspluato de Dagang-petrolkampo



**A**LIA nova petrolkampo Dagang estas konstruita en Ĉinio.

La nova petrolkampo situas sur marbordo oriente de norda Ĉinio. Ĝia prospektorado komenciĝis en 1964 kaj ĝia ekspluato estis disvolvata en la Granda Proleta Kultura Revolucio, post la petrolkampoj Daking kaj Ŝengli. Ĉiuj konstruaj laboroj estis projektitaj kaj faritaj per niaj propraj fortoj.

La jam akiritaj grandaj nombroj da geologiaj materialoj montris, ke ĝiaj petrola kaj gasa rezervoj estas riĉaj, ĝia petrola tavolo estas dika kaj ĝia petrola kvalito estas bona. La petrolkampo provizos nian landon per grandaj kvantoj da petrolo kaj natura gaso, kio havas gravan signifon por ŝanĝi la konsistigon de la brulaĵoj kaj akceli la disvolvon de industria kaj agrikultura produktado de nia lando.

Post ĉ. dekjara peniga luktado, prospektoroj jam boris tie grupon post grupo da esploraj putoj kaj trovis petrolon en loko, kie de longa tempo oni kredis ke mankas petrolo. Nun per vicoj da petrolputoj kaj reto da naftokondukaj tuboj oni daŭre eltiras kaj aliloken transportas la nafton profunde sin kaŝintan sub la tero. Dekoj da putoboraj turoj laboras sur la loko por plue ekspluati la petrolkampon. Kaj la sistemo de asfaltaj ŝoseoj kunligas la putojn, putborejojn, rafinejojn, laboristajn loĝpunktojn, hospitalon kaj magazenojn en unu integran tuton.

Laŭ la aserto de respondeculo de la petrolkampo, la produktokvanto de nafto kreskis meznombre per 60.9% ĉiujare de 1967 ĝis 1973, kaj en ĉiuj tiuj jaroj la ŝtata plano estis antaŭdate plenumita.

## SEKRETO DE FAŬLTO

Ekspluati nafton signifas ekkoni la staton de tertavoloj kelkmil metrojn profundaj sub la tersurfaco tute nevideblaj kaj netuŝeblaj. Dum la ekspluatado de Dagang-petrolkampo, por malkaŝi la sekreton de la profundaj tertavoloj, oni spertis batalon inter du pensoj de konado.

Dagang estas petrolkampo dispartigita de faŭlto kun komplika formacio. Trovinte ke la tieaj petroltenaj tavoloj estis jen dikaj jen maldikaj, jen aperantaj jen malaperantaj, kaj la nafta produkto estis jen alta jen malalta, iuj konsideris "la faŭltojn malutilaj". Kaj oni opiniis ke tiu petrolkampo similas al dispecigita telero, ĉe kiu oni ne povas trovi iajn leĝojn sekveblajn kaj malfacile povas plene koni ĝin, ili eĉ inklinitis al la penso, ke la loko ne indas esti ekspluatata. Ĉu vere oni ne povas trovi leĝojn ĉe formacio komplikita de faŭltoj? Ĉu la loko ne havas perspektivojn por ekspluatado? La vastaj amasoj de laboristoj insistis por daŭra borado kaj plua esplorado pri la formacio. La gvidantaro subtenis iliajn opiniojn kaj alvokis ĉiujn studi la filozofiajn verkojn de Prezidanto Maŭ *Pri Kontraŭdiroj* kaj

*Pri Praktiko*, por inspiri al ili, ke ĉiu afero estas konebla, kaj ke ili estu kuraĝaj en praktikado same kiel Daking-anoj por trovi la petrolriĉajn tavolojn. La laboristoj kaj teknikistoj eklernis praktikante. Ĉu en frosta vintro aŭ en varmega somero, ĉu en ventego aŭ sub pluvo, ili iris kun instrumentoj al la loko por fari prospektoradon. Ili elprenis pli ol 8,000 metrojn da rokkernoj, akiris riĉajn geologiajn materialojn, kaj pri tiuj faris kelkdek milfoje komparadojn kaj analizadojn. Ili prenis regionon kun pli multe da faŭltoj kiel ekzemplon, kaj kombinis sisan prospektoradon kun putobora esploro, por kolekti materialojn kaj fari sintezan analizon pri la faŭltoj. Rezulte oni trovis ke faŭlto ne estas tute malutila, sed male, ĝi povas bone konservi la petrolon kaj gason. Sekve de tio, la regiono, kiun oni antaŭe ne kuraĝis prospektori, fariĝis ekspluatata kiel altprodukta.

En la pasinteco, oni opiniis ĝenerale ke petrolo konserviĝas nur en sabloroko. En Dagang estis nombro da putoj, dum kies borado estis renkontitaj biokalkŝtonoj, kaj oni opiniis, ke tiuj putoj "ne havas ekspluatatan valoron". En la studado de *Pri Praktiko*, oni varme diskutis, ĉu tertavolo kun biokalkŝtono vere ne havas valoron por ekspluatado. Maljunaj laboristoj, kiuj partoprenis en la prospektorado, diris: "Ni ne devas esti katenitaj de malnovaj rutinoj, sed devas pene

praktiki por malfermi petrolan trezorejon." Post nelonge, dum borado de unu profunda puto, ili renkontis biokalkŝtonon kun spuro de petrolo kaj gaso. Ili decideme faris perforadon por certigi, kaj rezulte de tio elŝprucis abundegaj petrolo kaj gaso. Tiu sukceso multe edukis ĉiujn. Kaj la teknikistoj konsultis lokajn amasojn, faris surlokan enketadon, kaj unuapaŝe ekkonis la leĝon de dislokiĝo de biokalkŝtonoj. En la prospektorado, ili trovis tri biokalkŝtonajn petrolkampojn, ses petroldonajn distriktojn kaj ankaŭ novajn petrolhavajn ŝtonojn, tiel ke la areo de la petrolkampo estis plie vastigita.

### “NI KVAZAŬ REVENUS AL LA SIATEMPA DAKING”

“Venante al Ganghi, ni kvazaŭ revenus al la siatempa Daking.” diris Daking-aj laboristoj, kiuj venis al Dagang por helpi la konstruadon de la nova petrolkampo.


Tia estis vere la fakto. La petrolkampo Dagang estis konstruita de laboristoj dank’ al lernado kaj disvolvado de la spirito de Daking.

Ganghi estas unu el la distriktoj de Dagang-petrolkampo. Por rapidigi la konstruadon, la laboristoj faris tie brilan sturmon. En la 15 tagoj de sturmado, pluis dek tagojn. Pro malhelpo



*Altprema petrolgaso ŝprucis el nove borita oleputo.*





*Petrolaj laboristoj sur laborposteno*

de ĉie kovranta ŝlimo kaj akvo, ne povis iri aŭtoj kaj traktoroj. La maljunaj laboristoj venintaj de Daking gvidis la junajn por transporti ekipaĵojn per manoj kaj ŝultroj, same kiel tion faris la Daking-anoj siatempe. Dikaj lignaj stangoj rompiĝis sub pezaj portaĵoj, ili anstataŭigis ilin per ŝtalaj tuboj kaj per tiuj transportis la ekipaĵojn milojn kaj milojn da tunoj pezajn al antaŭdifinitaj lokoj. Veldistoj faris siamaniere veldadon sub pluvo, disrompante la malnovan rutinon de “nenia veldo en akvo”. Kiam ŝtaltuboj tremiĝis en akvo, du laboristoj zorgis por levi ilin kaj la tria faris la veldadon. Masonistoj faris sian laboron sub pluvo helpe de superkape etendita plastfolio kontraŭ pluvo, por ke la pluvo ne forlavu la morteron. Dank’ al tia alta revolucia energio, laboristoj plenumis en 15 tagoj la taskon bezonantan antaŭe du monatojn, grave kontribuante en produktado de nafto.

En la jaro 1964, kiam Dagang-petrolkampo komencis esti prospektorata, la tempo estis ĵus post katastrofo de inundo, kaj oni trovis antaŭ si akvodezerton, kie videblas nek vojo nek homoj. Tamen, la malfaciloj ne povis fortimigi la heroajn petrol-laboristojn. Prenante la “ferulon” Vang Ginhi kiel ekzemplon, ili laboris tag-nokte en frosta vento, sur glacio kaj neĝo, por elekti lokojn por bori putojn, ripari vojojn kaj konstrui pontojn. Post la alveno de ekipaĵoj, ili starigis turon kaj komencis boradon tuj en la sama punkto. Nur

per 18 tagoj, ili sukcesis finbore la unuan puton komplete bonkvalitan. Tuj poste, oni rapide vastigis la prospektoran areon.

La konstruado de Dagang-petrolkampo okazis ĝuste en la ŝtormo de la Granda Proleta Kultura Revolucio envolvanta la tutan landon. En tiu ĉi senprecedenca politika revolucio, la novaj kaj malnovaj laboristoj de la petrolkampo unuiĝis en kritikado kontraŭ la reviziismaj varoj de Liu Ŝaŭki, kiel “administrado de fabriko per specialistoj”, “filozofio de sklava adoro al fremduloj”, k.a., kaj prenante Daking-anojn kiel ekzemplon, ili persistis pri komandeco de la proletara politiko, pri kombino de koncentrita gvidado kun amasa movado kaj pri penema luktado en malfaciloj, kaj tiel akcelis la produktadon, venkinte diversajn malfacilojn.

Ekzemple, antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, la tekniko de firmigo de putomuro estis rigardata de iuj kiel io mistera, kaj ĝia plenumo estis ekskluzive rezervita al malmultaj “specialistoj”, tial, la procentoj de konformeco al normo de tiu laboro estis nealtaj. Post la fondiĝo de la revolucia komitato de la petrolkampo, ordinaraj laboristoj transprenis la surlokan komandon de firmigado de putomuro. Dank’ al kuna klopodo de laboristoj kaj teknikistoj, la procentoj de konformeco al normo de tiu laboro superis 95.

En la pasinteco, pri la difinitaj procedoj de putoborado oni ne permesis al laboristoj fari ajnan





*Li Kjuanheng, vickomandanto de la petrolkampo, deveninta de laboristo, kune kun junaj laboristoj*

ŝanĝeton kaj la plej bona putobora taĉmento siatempe povis bori nur pli ol 10,000 metrojn ĉiujare. En la granda kultura revolucio, sub la gvido de la revolucia komitato la laboristoj renovigis teknologiojn laŭ konkretaj kondiĉoj, tiel ke unu putobora taĉmento povis bori pli ol 50,000 metrojn en unu jaro.

En la jaro 1974, la grandioza movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio forte disvolviĝas tra la vasta petrolkampo. Dekmiloj da petrol-laboristoj indigne kritikis la krimojn de Lin Biaŭ, kiu imitante Konfucion, pledis por "sinregi por restarigi la etiketon" kaj arogante klopodis por ŝanĝi la fundamentan linion de la Partio en la tuta historia etapo de socialismo, renversi la diktaturon de la proletaro kaj restaŭri kapitalismon. Laboristoj kritikis ankaŭ la reaciajn sensencaĵojn de la kontraŭpartia kliko de Lin Biaŭ nei la grandan kulturen revolucion. La laboristoj montris, ke sen la Granda Proleta Kultura Revolucio ne estus la hodiaŭa Dagang-petrolkampo. Kaj la fakto ke nia lando efektivigis memsufiĉon de petrolo en sesdekaj jaroj kaj eksportis nafton en la sepdekaj jaroj, estas forta refuto al la kalumnio de la kontraŭpartia kliko de Lin Biaŭ kontraŭ la granda kultura revolucio.

La laboristoj decidis firmigi kaj disvolvi la fruktojn akiritajn el la venko de la granda kultura revolucio por realaj agoj.

### **RIGORA SCIENCA SPIRITO**

Oni trovis tian puton, el kiu jen grandkvante jen malmulte elŝprucis petrolo kaj gaso, kaŭze de interformacia ĝeno. Kiel do oni povis elmezuri ĝian produktokvanton en normala stato? Ili alterne deĵoris en skipoj tagnokte ĉe la putoj, por akiri materialojn pri petrolopremo kaj la sonoj de elŝpruco de petrolo kaj gaso, kaj de tempo al tempo analizadis la petrolajn specimenojn en mallongaj intertempoj. Dank' al tio, ili akiris ĉ. 2,000 donitaĵojn, el kiuj ili faris diagramon montrantan rilatojn inter la premo, kvanto kaj akvoenteno de petrolo, lige kun analizo de la historiaj materialoj de la putoj, kaj fine atingis sian celon.

Tiam putoj estis malmultaj, tamen, la seriozeco en lernado de Daking-anoj, kiun montris la laboristoj por disvolvi la seriozan sciencan spiriton kaj rigoran laborstilon, estas ĉie trovebla.

Por akiri komplete kaj precize geologian materialon kaj bone ellabori putoboran projekton, la geologiaj laborantoj ne sidis en siaj kabinetoj,

sed iris al la petrolkampo por difini putopoziciojn. Dum la putoborado, ili konstante analizis surloke por determini precize la lokigon de petrol-tavolo. Kunlabore kun ili, ankaŭ la putoboristoj atentis kolekti historiajn materialojn de ĉirkaŭaj putoj, por fari komparon kaj analizon, antaŭ komenco de borado, kaj dum borado ĉiam esploris la staton de la tertavolo por trovi pli taŭgan putoboran projekton precize konforman al la realaj kondiĉoj. La putoboristoj ĉiam atente esploris kaj plene ekkonis la karakteron de drilego kaj borstango por plejble rapidigi la boradon kaj redukti la frot-difektiĝon de la drilego. Iu putobora taĉmento mallongigis la tempon por borado de profunda puto de ordinare pli ol 20 tagoj al nur dekelkaj tagoj, kun fundamente sama profundeco kaj samaj kondiĉoj geologiaj. Depost partopreno en konstruado de Dagang-petrolkampo, ili jam boris 143 putojn kaj per tio viciĝis inter la progresintajn putoborajn taĉmentojn de la tuta lando.


Dum la putoborado, borstangoj ofte rompiĝis ne plu uzeble post longtempa uzado. Ĉu eblas kunvendi ilin por plilongigi la uzadon? Tion iuj jam provis en la pasinteco, sed malsukcesis pro nebona veldlaboro. En la granda kultura revolucio, laboristoj de la tubprovizejo de Dagang-petrol-

kampo proponis reprovadon. Tion subtenis kaj kuraĝigis la partia organizo. Dum provado oni elpaŝis kuraĝe kaj akumulinte iom post iom multan sperton, fine konstruis tiucelan aŭtomatan elektran transversan veldmaŝinon. La fortikeco de la borstangoj kunvelditaj per tiu maŝino preskaŭ egalas al la neuzitaj, kaj post dujara uzado, malofte okazis rompiĝo ĉe la veldpunkto.

En la lastaj ĉ. kvar jaroj, la laboristoj faris sume pli ol 100 grandajn teknikajn renovigojn kaj teknikajn reformojn, el kiuj la aŭtomata elektra transversa veldmaŝino, aŭtomata senvaksigilo, senrustigilo por subĉielaj tuboj, maŝino por izoli tubojn k.a. atingis progresintan nivelon en la lando.

Ĝojinde estas, ke tiaj revolucia spirito kaj rigora scienca sintenado en la konstruado de Dagang-petrolkampo elmontriĝas ne nur ĉe la laboristoj maljunaj sed ankaŭ ĉe la junaj kun laboraĝo de nur 2-3 jaroj. La supre menciitaj aferoj estis kreitaj de junaj laboristoj kaj teknikistoj sub la gvido de la maljunaj laboristoj. Iuj el la junaj laboristoj nun jam fariĝis kvalifikitaj ĉefboristoj aŭ putestroj aŭ faris iajn inventojn kaj kreojn. Ili estas vivoplena forto en la konstruado de Dagang-petrolkampo.

*Translokiĝo de putoturo en kompleto*





# Heroinoj venis al la postfronto

**V**ICĈEFKOMANDANTINO de la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj de Suda Vjetnamio Nguyen Thi Dinh kaj de ŝi gvidata Delegacio de la Sudvjetnama Virina Asocio por Liberiĝo venis de la batalanta fronto al la vasta postfronto — Ĉinio. Ili alportis al la ĉinaj virinoj kaj popolo ĝojindan informon pri venkoj de la sudvjetnama popolo en la naciŝva milito kontraŭ la usona agresado kaj ankaŭ profundan amikecon de la kunbatalantoj.

La ĉinaj virinoj kaj popolo esprimis altan respekton al la heroaj fratinoj venintaj de la fronto.


## LERNI DE LA HEROAJ FRATINOJ

La vjetnama popolo estas heroo popolo kaj la vjetnamaj virinoj estas bravaj virinoj. En la militaj jaroj aperis sennombraj neflekseblaj heroinoj kaj cirkulis multaj rakontoj pri iliaj kortuŝaj faroj. Antaŭ sia forpaso la estimata kaj amata gvidanto de

*Ĝoŭ Enlaj, Vang Hongven, Je Gianjing, Giang King, Gi Dengkuj kaj aliaj kamaradoj intervidiĝas kun la Delegacio de la Sudvjetnama Virina Asocio por Liberiĝo.*







*Virinoj de diversaj rondoj de Pekino kunvenas por varme bonvenigi la delegacion.*

la vjetnama popolo Ho Chi Minh varme laŭdis la sudvjetnamajn virinojn kiel "armeon de longharuloj". Ili batalis kune kun viroj ŝultron ĉe ŝultro kaj faris valoran kontribuon al la granda venko de la nacisava milito kontraŭ la usona agresado. Vicĉefkomandantino Nguyen Thi Dinh kaj aliaj fratinoj de la delegacio estas eminentaj reprezentantoj de miloj kaj dekmiloj da heroaj filinoj de Vjetnamio kaj ankaŭ bonaj ekzemploj lernindaj por la ĉina popolo kaj ĉinaj virinoj.

Vicĉefkomandantino Nguyen Thi Dinh aĝas pli ol 50 jarojn. En 1936, kiam ŝi ĵus atingis la aĝon de 16 jaroj, ŝi ĵetis sin en la batalon kontraŭ la francaj agresantoj. En la tre malfacilaj batalaj jaroj ŝi kune kun la sudvjetnama popolo brave surprizis malamikojn. En la malamika karcero ŝi faris obstinan batalon. En sia aĝo de 24 jaroj tiu brava batalantino jam gvidis la faman armitan insurekcion de la Aŭgusta Revolucio de la popolo de provinco Ben Tre. Poste, kiam komenciĝis la pli intensa nacisava milito kontraŭ la usona agresado, Nguyen Thi Dinh, malgraŭ vivdanĝero, faris penegan lukton kune kun la sudvjetnamaj virinoj sub sia gvido, forte batis kaj ekstermis malamikojn. Ĉar tiu heroino estis grava minaco por la malamikoj, la reakcia kliko de Ngo Dinh Diem promesis monon por kapti ŝin. Eĉ en tia cirkonstanco ŝi persistis en disvolvo de revoluciaj organizoj kaj profunda mobilizo de la amasoj, tiel ke la revoluciaj fortoj pli kaj pli grandiĝis. Ŝiaj heroaĵoj cirkulis tra la tuta Suda Vjetnamio kaj ŝi ĝuas konfidon kaj amon de armeanoj, popolanoj kaj virinoj de Suda Vjetnamio.

En la delegacio troviĝis ankaŭ eminentaj reprezentantoj de la juna generacio de Suda Vjetnamio. La 28-jara heroino Nguyen Thi Lai partoprenis en pli ol cent bataloj, persone ekstermis pli ol 200 usonajn kaj pupajn trupanojn kaj lokajn tiranojn

kaj detruis 15 malamikajn veturilojn. La 23-jara Nguyen Thi Oanh estas bravulino en ekstermado de la usonaj kaj pupaj trupanoj. Kvankam ŝi estas malaltstatura, tamen ŝi faris elstaran meriton en la nacisava milito kontraŭ la usona agresado. En la intensa batalo en 1968 por surprizi la ĝeneralan stabon de saĝona pupa reĝimo, ŝi kune kun siaj kunbatalantoj persistis tri tagojn kaj saĝe kaj brave ekstermis grandan nombron da malamikoj. En sia aĝo de 17 jaroj, Nguyen Thi Hong Diep, bravulino en ekstermado de la usonaj kaj pupaj trupanoj, sin ĵetis en la batalon por defendi la hejmlokon kune kun aliaj fratinoj. Ŝi partoprenis sume en 36 bataloj, ekstermis 198 malamikojn, dronigis 5 malamikajn militŝipojn kaj difektis 6 malamikajn helikopterojn. La heroa spirito de la sudvjetnamaj virinoj en la batalo admiris la ĉinan popolon kaj ĉinajn virinojn kaj donis al ili grandan kuraĝigon.

## INTIMA INTERVIDIĜO

Vespere de la 5-a de majo 1974, brile lumis lampoj en la salono de la Popola Halo en Pekino. Tie la gvidantoj de niaj Partio kaj ŝtato kamaradoj Ĝou Enlaj, Vang Hongven, Je Gianjing, Giang King, Gi Dengkuj kaj aliaj intervidiĝis kun la kunbatalantinoj el Suda Vjetnamio. Vicĉefkomandantino Nguyen Thi Dinh ĝoje elprenis aŭtomatan fusilon de usona M 16-tipo el la ligna kesto kaj donacis ĝin al la ĉinaj gvidantoj. Preninte la fusilon, ĉefministro Ĝou Enlaj varme dankis vicĉefkomandantinon Nguyen Thi Dinh kaj kunbatalantinojn de Suda Vjetnamio pro ilia profunda batala amikeco kaj deziris al la sudvjetnamaj popolo kaj virinoj ankoraŭ pli grandajn venkojn.

Tiu ĉi fusilo estis predita de la sudvjetnamaj armeanoj kaj popolanoj en iu batalo persone komandata de vicĉefkomandantino Nguyen Thi

Dinh. Tio okazis nelonge post subskribo de la pariza interkonsento pri armistico. Subtenate de Usono la aŭtoritato de Sajgono senĉese rongis la liberigitajn regionojn gvidatajn de la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio. En junio de 1973 du malamikaj divizioj tiamaniere atakis la liberigitan regionon en provinco Chuong Thien. La freneza militprovoko forte indignigis la armeanojn kaj popolanojn de la liberigita regiono. Je la 25-a de junio en regiono Dai Cau de la nomita provinco, sub komando de vicĉefkomandantino Nguyen Thi Dinh, unu kompanio de la sudvjetnama liberiga armeo, kunagante kun la lokaj popolaj armitaj fortoj, frakasis atakon de la malamikoj en la malfavora kondiĉo, ke la nombro de la malamikoj estis multe pli granda ol la ilia. Ili ekstermis unu malamikan batalionon kaj forte vundis la alian, militkaptis pli ol cent pupajn trupanojn kaj predis pli ol 50 aŭtomatajn fusilojn. Hontinde fiaskis la malamika plano de rongâ atako.

Post la venko la batalantoj donacis al vicĉefkomandantino Nguyen Thi Dinh unu el la kaptitaj fusiloj kiel memoraĵon. Nun ŝi kun plena amikeco de la kunbatalantoj donacis ĝin al la ĉinaj gvidantoj. Ŝi esprimis, ke kvankam la aŭtoritato de Sajgono, subtenate de Usono, senĉese malobservas la parizan interkonsenton pri armistico kaj intensigas militan agadon, tamen la sudvjetnama popolo decidis defendi la parizan interkonsenton kaj revoluciajn fruktojn. Ŝi kore dankis la ĉinan


popolon pro ĝia helpo al la sudvjetnama popolo en la batalo.

## SAMA BATALA TRAVIVAĴO

Dum vizitado al Ĉinio la kunbatalantinoj el Suda Vjetnamio rigardis la kampon de la fama tunela milito en Giaŭĝuanghu de Hebej-provinco. En la jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito de la ĉina popolo tiu malgranda vilaĝo kun nur pli ol cent familioj faris pinto-kontraŭ-pintan gerilan kaj tunelan militon kontraŭ la malamikoj. Ili fosis rete interkruciĝantajn subterajn tunelojn en spaco de dekelkaj kilometroj, per kiuj ili forte batis la malamikojn kaj ĵetis ilin en teruran panikon.

La heroinoj sentis apartan intimecon, kiam ili intervidiĝis kun la tieaj ĉinaj malnovaj milicaj herooj kaj junaj milicanoj. La komuna batalo kaj sama travivaĵo strikte kunligis la korojn de la gefratoj de Ĉinio kaj Vjetnamio. Vidinte ekspozitajn glavojn kaj pafilojn uzitajn de la tiamaj milicanoj, vicĉefkomandantino Nguyen Thi Dinh kun profunda sento diris, ke ankaŭ la sudvjetnama popolo uzis tiajn simplajn armilojn en sia batalo kaj venkis la potencajn malamikojn ĝuste sin apogante sur siaj propraj fortoj.

Akompanate de la tiama milica heroo Ma Vencaŭ kaj respondeca kamarado de Ŝunji-gubernio, la gastoj kun granda intereso eniris en la tunelojn. Tie la zigzagaj tuneloj longas je pli ol dek ki-



*Sur la militŝipo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo*



lometroj kaj sin kondukas al diversaj direktoj. La kunbatalantoj haltis ĉe iu paftruo de la tunelo kaj faris observadon tra ĝi.

Ili tre admiris la saĝon kaj bravecon de la tiamaj ĉinaj milicianoj. Vicĉefkomandantino Nguyen Thi Dinh diris, ke ankaŭ en la montregionoj de Suda Vjetnamio la popolamasoj uzis tunelojn por bati la malamikojn. Tamen en la ebenaj regionoj oni plimulte uzis ŝirmejojn kaj kavernetojn por ekstermi malamikojn. Post tio la gastoj venis al la pafejo por rigardi pafadon de la milicianoj. En bruo "paf!" "paf!" falis ĉiuj celtabuloj. Vicĉefkomandantino Nguyen Thi Dinh diris: "Vi trafe pafis kaj ni tre ĝojas pro via elstara sukceso."

### INTER LA ĈINAJ MARARMEANOJ

La heroaj batalantinoj venintaj de la fronto montris aparte profundan amikecon al la komandantoj kaj batalantoj de ĈPLA. Sur la ondanta Huangpu-rivero de Ŝanhajo la kunbatalantoj el Suda Vjetnamio ascendis militŝipon ornamitan per multaj flagoj kaj intervidiĝis kun mararmeanoj de ĈPLA. Tiutage la mararmeanoj en vicoj staris sur ferdeko de la militŝipo kaj sur kajo por saluti la batalamikojn. Vicĉefkomandantino Nguyen Thi Dinh en uniformo de la liberiga armeo de Suda Vjetnamio viglanime venis inter la mararmeanojn kaj senĉese salutis ilin svingante la manon kaj transdonis al ili saluton de la kunbatalantoj de la fronto.



*Estrino de la delegacio Nguyen Thi Dinh inter knabinoj en la Domo por Geknaboj de Ŝanhajo*

Sur la militŝipo projektita kaj konstruita de la ĉina popolo mem vicĉefkomandantino Nguyen Thi Dinh atente pririgardis diversajn ekipaĵojn. Ŝi venis en kajutojn kaj al ĉiuj batalpostenoj kaj demandis pri lerno kaj laboro de la armeanoj. Sur Ĉanggiang-militŝipo la politika komisaro Ĝang Guangdong rakontis al la gastoj pri inspektado de Prezidanto Maŭ al la ŝipo kaj lia intervidiĝo kun la mararmeanoj. Li diris, ke ili firme subtenas la vjetnaman popolon en ĝia justa batalo



*La Delegacio de la Sudvjetnama Virina Asocio por Liberiĝo rigardas la ekspozicion de metiartaĵoj en Pekino.*





laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ. La batalantoj kaj popoloj de la du landoj ĉiam kune batalos kaj venkos. Vicĉefkomandantino Nguyen Thi Dinh ĝoje surmetis ĉapon de mararmeano de ĈPLA kaj fotigis sin kaj la batalantojn por memoro sur la ferdeko kie Prezidanto Maŭ en sia tempo fotigis sin kun la mararmeanoj.


Ŝi donacis al la mararmeanoj pelvon plektitan per diverskoloraj elektrodratoj. Tiuj dratoj estis eltranĉitaj de elektraj pikdratoj per kiuj la usonaj agresantoj intencis apartigi la sudan parton de Vjetnamio de la norda. La sudvjetnamaj virinoj donis baton al la usonaj agresantoj kaj detruis la pikdratojn. Vicĉefkomandantino Nguyen Thi Dinh diris, ke tiu donacaĵo esprimis ilian batalan amikecon kaj ili decidis daŭre batali por liberigi la sudan parton de Vjetnamio kaj unuigi la patrolandon.

## NI ESTAS SAMFAMILIANOJ

Dum sia vizitado al Ĉinio la heroaj fratinoj el Suda Vjetnamio ĉiam trovis varman bonvenigon de la ĉinaj gefratoj kien ajn ili venis. Tio plene enkorpigis la sinceran rilaton inter la fronto kaj postfronto. En la Pekina Aŭtofabriko laboristoj donacis al la delegacio modelon de ĵipo produktita de ili mem. Tiaj ĵipoj produktitaj de tiu fabriko iam galopis sur la tero de Suda Vjetnamio. Por

pli bone subteni Vjetnamion la laboristoj senĉese plibonigis la kvaliton de la veturiloj, por ke ili konformu al veturado en monta kaj malseka regionoj. Tie vicĉefkomandantino Nguyen Thi Dinh intime manpremis kaj interparolis kun laboristoj. La veterana laboristo de la fabriko Ĉen Kinian emocie diris: “La justa batalo de la vjetnama popolo estas la plej granda subteno al la ĉina popolo. Ni ĵuras ĉiam esti potenca apogilo de la vjetnama popolo.”

La membroj de Sanlin-popolkomunumo de Ŝanhajo ĝoje akceptis la heroajn fratinojn. La gastoj pririgardis tie fabrikon de agrikulturaj maŝinoj, brutobredejon, elektran irigacian stacion kaj infanĝardenon. Ĉe la tritikkampoj vicĉefkomandantino Nguyen Thi Dinh deŝiris plenan tritikspikon kaj diris: “Mi kunportos ĝin al la fronto por ke niaj batalantoj sciu kiel diligente laboras la popolo en la postfronto por subteni la fronton per pliprodukto.” La komunumanoj diris: “La sudvjetnama popolo kaj batalas kaj persiste produktas, tio estas pli lerninda por ni.” Ili varme invitis la vizitantojn al sia hejmo por gastigi ilin. Komunumano Ŝen Gin-gjuan tenis la manon de la vicĉefkomandantino kaj intime diris: “Ni estas samfamilianoj! Bonvolu viziti nin en la venonta fojo.” La lasta kun profunda sento diris: “Ni nepre vizitos vin ankoraŭfoje, kiam la suda parto de Vjetnamio estos liberigita kaj nia patrolando unuigita!”



*Inter Amikoj*

# La Japana Esperanto-Delegacio en Ĉinio

**E**N aprila Pekino serenas la ĉielo kaj prosperas floroj. Ĝuste en tia bela tempo la Japana Esperanto-Delegacio kun D-ro Toida Naoki kiel la estro kaj S-ino Isobe Jukiko kiel vicestro (S-ro Itoo Eizo, S-ro Tokuda Rokuro, S-ro Takenaka Ĝisuke, S-ro Koseki Joŝio, F-ino Tanaka Joŝino kaj S-ro Muramacu Jukijoŝi kiel membroj) venis al Ĉinio por fari amikan viziton laŭ invito de la Ĉina Esperanto-Ligo. Kvankam la vizitado daŭris nur du semajnojn, tamen neforgesebla estas la amikeco de la japana popolo kaj japanaj esperantistoj alportita de ili al ni.

Akompanate de Ĉen Juan, ĝenerala sekretario de ĈEL, la delegacio vizitis en Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono fabrikojn, popolajn komunumojn, hidroelektrejon, hospitalon, lernejojn, infanĝardenon, domon por geknaboj, industrian ekspozicion, ekspozicion de metiartaĵoj kaj la Foiron de Ĉinaj


Eksportaj Varoj, rigardis pitoreskejojn kaj historiajn restaĵojn kaj spektis artan kaj sportan prezentojn. Kien la delegacio iris, tie ĝi ĉiam trovis varman bonvenigon kaj akcepton de la ĉinaj popolanoj inkluzive de ĉinaj esperantistoj. En la dua tago, post kiam la delegacio atingis Pekinon, okazis agrabla renkontiĝo de pekinaj esperantistoj kun ĉiuj membroj de la delegacio sur Kunming-lago de la pitoreska Somera Palaco, kie surŝipe ili multe parolis pri la amikeco inter popoloj kaj esperantistoj de Ĉinio kaj Japanio. Vespere de la sama tago, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo Hujucz intervidiĝis kun la delegacio kaj aranĝis por ĝi festenon. K-do Ĵelezo, vicprezidanto de ĈEL, kaj S-ro Toida, estro de la delegacio, faris varmajn paroladojn. Ili ambaŭ deziris, ke la amikeco inter la popoloj kaj esperantistoj de la du landoj kresku tagon post tago.



*Foto de ĉiuj ĉeestantoj de la kunsido*



Kiam la delegacio venis al la infanĝardeno kaj domo por geknaboj, naivaj kaj gajaj infanoj staris ambaŭflanke de la vojo por bonvenigi la gastojn el Japanio, svingante florfaskojn kaj kolorajn rubandojn, kaj prezentis por ili kantojn kaj dancojn. La afableco de la infanoj multe kortuŝis la gastojn, iujn el ili eĉ ĝis larmoj. En la Centra Instituto por Nacimalplimulto la respondeca kamarado de la revolucia komitato de la instituto kaj diversnaciecaj studentoj en siaj propraj naciaj kostumoj akompanis la delegacion en la vizitado. En iu mezlernejo de Ŝanhajo 15-16-jara lernantino diris al la delegacio en la kunsido: "Same kiel aliaj ĉinaj popoloj, ni ĉinaj lernantoj firme subtenas la japanan popolon en ĝia justa batalo por revenigi la nordajn kvar insulojn." Tio forte emociis la gastojn. Ili estis kortuŝitaj ankaŭ de tio, ke lernantoj skribis "Vivu la amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj!" kaj aliajn samsencajn vortojn en la lekcio pri ĉina kaligrafio kaj donacis la skribaĵojn al la gastoj. Ĉie en la fabrikoj, popolaj komunumoj kaj lernejoj, kiujn la gastoj vizitis, estis videblaj sloganoj "Varman bonvenon al la japanaj esperantaj amikoj!". La japanaj amikoj ĝoje diris, ke la bonvenigo de la ĉina popolo al ili plene enkorpiĝis la amikecon inter la ĉina kaj japana popoloj. Ili plurfoje deziris, ke la du popoloj amike kunvivu de generacio al generacio.



*K-do Ĉen Juan (la dekstra), S-ro Toida Naoki (la meza) kaj nia peranto S-ro Takenaka Ĝisuke sur la Granda Muro*

En Ĉinio la delegacio vaste kontaktiĝis kun ĉinaj esperantistoj, junaj kaj maljunaj, viraj kaj virinaj. Krom la renkontiĝo en la Somera Palaco,



*S-ro Toida Naoki (la unua de dekstre), K-do Ĵelezo (la dua de dekstre) kaj S-ino Isobe Jukiko (la staranta) sur boato en la Somera Palaco*

la pekinaj esperantistoj okazigis ankaŭ kunsidon kun la japanaj samideanoj, en kiu la ĉeestantoj de la ambaŭ landoj interŝanĝis diversajn aferojn. En la kunsido pekinaj esperantistoj de pluraj unuoj donacis al la gastoj donacaĵojn inkluzive de *Noveloj de Lusin* (plena kolekto). En Ŝanhajo, akompanate de du lokaj esperantistoj la delegacio ĝoje pasigis 2-3 tagojn. En Kantono, en la festeno aranĝita por adiaŭi la delegacion ĉiuj gastoj tre emociiĝis kaj sentis apartan intimecon kiam ili informiĝis, ke mastro de la festeno estas veterana esperantisto, kiu eklernis Esperanton frue en tridekaj jaroj por la ĉina liberiga afero. Ili diris: "Dum la vizitado nin precipe ĝojigis tio, ke dank' al Esperanto ni povas rekte interparoli kun ĉinaj amikoj, tio ne nur profundigis nian interkompreniĝon, sed ankaŭ akcelis nian amikecon." La ĉinaj esperantistoj petis amikojn de la delegacio transdoni iliajn koran saluton kaj bondeziron al la japana popolo kaj japanaj esperantistoj.

Dum la du semajnoj en Ĉinio la delegacio esprimis favorajn opiniojn pri la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de Ĉinio. Ili rigardis relative grandan Ĝeneralan Dizelan Fabrikon de Pekino kaj ankaŭ malgrandan fabrikon de kemisterko de komunumo, kaj dank' al tio ili havigis al si fundamentan konon pri la principo de nia lando pri sinapogo sur propraj fortoj kaj penema lukto kontraŭ malfaciloj. Vicestrino de la delegacio fotografis la fabriketon de kemisterko kaj diris: "Mi diros al japanaj kamparanoj post mia hejmenreveno, ke tiu estas fabriketo konstruita de ĉinaj kamparanoj per siaj propraj manoj kaj servanta por ili mem." En iu kadra lernejo en antaŭurbo de Pekino la delegacio venis al loĝdomo kaj kunsidis tie kun 11 lernantoj. La lastaj rakontis al ili per siaj propraj travivaĵoj kaj spertoj, kiel ili reformas sian mondkoncepton per studo de verkoj de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Maŭ Zedong kaj partopreno en fizika laboro. Ili ankaŭ per facile kompreneblaj vortoj klarigis al la gastoj pri granda signifo de la movado de kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio. Iu membro de la delegacio diris: "Hodiaŭ mi aŭdis klarigon pri la movado el buŝo de ĉina ordinara kadro, tio profundigis mian komprenon pri ĝi." En Kantono la japanaj amikoj renkontis en iu komunumo intelektajn gejunulojn laborantajn fizike en la komunumo. Ili estis kontentaj ke ili havis okazon interparoli kun ili, ĉar dank' al tio ili eksciis la veran sencon de iro de ĉinaj junuloj al kamparo por akcepti reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ĉiuj membroj de

la delegacio havis grandan intereson pri la vivo de la ĉina popolo, inkluzive de vivo kaj eduko de infanoj, kaj multe pririgardis, multe pridemandis kaj multe fotis. Estis kompreneble ke la du membrinoj donis apartan atenton al la sorto de la ĉinaj virinoj. Kiam ili vizitis la Ĝeneralan Dizelan Fabrikon de Pekino, ili detale pridemandis pri laboro kaj vivo de laboristinoj kaj faris notojn. Ili esprimis, ke ili informos ĉion viditan en Ĉinio al la japanaj virinoj.

Je la 29-a de aprilo la delegacio kun amikeco de la ĉina popolo kaj ĉinaj esperantistoj forlasis Ĉinion. Ni konvinkiĝas, ke la vizitado de la delegacio certe akcelos la amikecon inter la popoloj kaj esperantistoj de Ĉinio kaj Japanio.

*La gastoj kaj pekinaj geesperantistoj vizitas Dingling-maŭzoleon*







### NOVA REKORDO DE SUKERA PRODUKTO DE ĈINIO

Dum la periodo de sukerpreparado en 1973—1974, la sukera produktokvanto de Ĉinio atingis rekordon plej bonan depost la Liberiĝo en 1949. La Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono kaj Siĉuan-provinco atingis sian plej altan nivelon de sukero-produkto. Ankaŭ tiu de Hejlonggiang, Hingiang kaj Interna Mongolio kreskis. Kaj la provincoj Hebej, Liaŭning kaj Anhuĵ, kiuj antaŭe ne produktis sukeron, starigis per siaj propraj fortoj nombron da malgrandaj sukerfabrikoj en la lastaj jaroj.


### FLUOREGULIGA KLIZO DE LA EKSTERA RIVERO NOVE KONSTRUITA SUR DUGIANG-JAN

Sub la puŝado de la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la fluoreguliga kluzo de la Ekstera Rivero, unu el gravaj partoj de la akvoreguliga ŝlosila konstruaĵo Dugiang-jan de Siĉuan-provin-

co, estis konstruita kaj ekfunkciigita en aprilo ĉijare.

Dugiang-jan kun historio de pli ol du mil jaroj estas granda akvoreguliga konstruaĵo, irigacia kaj drena, kreita de nia antikva laboranta popolo sur la meza parto de la rivero Mingiang, en okcidento de Siĉuan-provinco. En la pasinteco, oni uzis laŭbezone instaleblajn aŭ forigeblajn barilojn nomatajn ĉine *maĉa* por reguligi la departigitan flukvanton. La metodo bezonis multajn homfortojn kaj materialojn, kaj ne efikis rapide. Nun tiu ĉi metodo jam ne konformas al la ĉiam pli vastiĝanta areo de irigaciendaj kampoj, ampleksanta nun 500,000 hektarojn, t.e. kvar-oblo de tiu antaŭ la Liberiĝo, kaj estontece eĉ plivastigota super 600,000 hektaroj. Pro tio, la koncerna institucio decidis konstrui tiun ĉi ferbetonan elektran kluzon proksime de la antaŭa akvodivida digo por anstataŭigi la originajn *maĉa*-ojn.


La ok-porda elektra kluzo altas 12 metrojn kaj longas 104 metrojn. Ĝia ekfunkcio plie disvolvos la rolon de Dugiang-jan en drenado, irigaciado, transportado de lignoj kaj livero de akvo al industrioj.



Inaŭguro de la Foiro de  
Ĉinaj Eksportaj Varoj en  
Printempo de 1974



# La Foiro de Ĉinaj Eksportaj Varoj en Printempo de 1974




La nova domo de la Foiro de  
Ĉinaj Eksportaj Varoj





Gastoj de komercaj rondoĵoj venintaj de kvin kontinentoj, elmigrintaj ĉinoj kaj samlandanoj en Hongkongo kaj Aŭmen partoprenas en la inaŭguro.

Gastoj vizitas ekspozician halon de la verkoj de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ.





Persistante en la principo de "sendependeco kaj memdecidemo, sinapogo sur la propraj fortoj", Daking-aj laboristoj peneme luktadis pli ol dek jarojn kaj konstruis sur dezerta stepo la bazlokon de petrola industrio de Ĉinio, per kio ili multe kontribuis al petrola memprovizo de la lando. La pakistanaj gastoj pririgardas la modelon de Daking-a petrolkampo.




Gastoj pririgardas modelon de Daĝaj-brigado — la ruĝa flago sur la agrikultura fronto de Ĉinio.







Il-mašinoj ekspoziciataj spegulas novan sukceson de la mekanika industrio de Ĉinio.




la halo de metalurgia industrio




La gastoj de Latinameriko pri gardas preciza elektran gravur maŝinon fabriki tan de Ĉinio.




Lasera nubreflek toro ekspoziciata en la halo de elektrona industrio







Afrikaj gastoj pririgardas instru-  
mentojn kaj agrikulturilojn.



Vjetnamaj gastoj pririgar  
agrikulturajn maŝinojn.

La tapiŝoj kaj murtapiŝoj kun nacia karaktero de Ĉinio





Ekspozicia halo de ajuraĵoj kaj brodaĵoj



Gastoj rigardas Suĝou-an brodadon.



En la halo de tekstilaĵoj





Diversaj famaj specoj de teo



Bambuaj plektaĵoj



Gastoj de arabaj landoj elektas ladmanĝaĵojn en ekspozicia halo de greno, oleo kaj manĝaĵoj.



Gastoj elektas ludilojn.

# Batalo ĉe Hiŝa-insularo



(Raporto en versoj)

## IV. LA FLAG' NACIA FLIRTAS SUPER HIŜA-INSULARO

Matena vent' susuras,  
militaj ŝipoj kuras.

La loĝkajutoj estas plenaj  
de infanterianoj kaj de milicanoj.

L' armeo kaj popolo, por la liberigo  
de l' kara insularo, kune luktas kontraŭ l' mal-  
amiko!

Rekruto li-nacia  
kun dorso kontraŭ ŝipa vand', pafilo  
ĉe l' sino lia,  
elstara larĝa frunt' simila  
al la rokmuro de Vuĝi-montaro\*,  
la stelsimila okulparo  
plenplena je entuziasmo brula  
kaj liaj rondaj grasaj vangoj  
similaj al ruĝega kafograjn' matura.  
Sur la maldekstra brako sia  
li iam portis la rubandon ruĝgvardian,  
la man' tenanta la pafilon  
verkadis por kondamni perfidulon Lin Biaŭ.  
Hodiaŭ, per la varma sango,

diziras li skribi dazibaŭ-on  
kaj ĝin pendigi super Pacifikon:  
Teritori' la ĉina estas ja neniel invadebla,  
la fajrludantaj agresantoj certe trafos sinbruligon!

La mar' abrupte ektumultis,  
kaj ekvilibron teni la rekruto ne plu povis.  
Li sentis kapturniĝon kaj vomadis.  
Jen supren, jen malsupren la ŝipkorp' sin movis.

Masaĝis lin la politika komisaro.  
"Ne gravas", li konsolis trankvilige.  
Biskvitojn kunpremitajn Aĉun elpoŝigis  
kaj maĉis, glutis kun bolinta akvo malrapide.  
"Kunbatalanto!

La maron mi Aĉun jam bone konas,  
vominte mi remanĝos,  
manĝinte mi revomos,  
mi min monttigran en mardrakon ŝanĝos."

Li Aĉun, la rekruto,  
klopodis por fariĝi, ĉion-spite,



---

avangardul' en liberig' de l' kara insularo.

Subite

tin-tin-tin!

tra l' tuta ŝip' alarm' sonoris!

Je tiu voko al batalo

la kapturniĝon kaj vomadon malmemoris

l' armeo kaj popolo, tuj pafilon prenis,

kuraĝe kaj lertmove

sur la ferdekon facilpaŝe venis.

La blua mar' kovriĝis per muslino,

ĉe l' horizonto fosis matenruĝa strio.

En nia fronto

vidiĝis grize-blanka strek-linio —

jen nia kara insularo okupita de l' saĝona pup-  
armeo.

Ĝi estas stelo de l' teritori' de la patrio.

.....

Jen, Aĉun kvazaŭ vidis

ke brutaj hufoj tretas ŝian korpon el koralo,

kaj sentis akran kor-doloron.

Li elpaŝis vokante l' estron

kaj diris sian taskplenuman volon ardan:

“Tuj donu al mi la naci-standardon!

Nur se vivspiro al mi restos,

mi certe sur la patrolandan insularon ĝin starigos,

kaj la emancipiĝon de la tuta Hiŝa bonvenigos!”

Karesis l' estro liajn ŝultrojn

kaj lia vivplenec' lin ravis.

L' junul' jam faris triaklasan meritajon,

kvankam nur unu-jaran servon en l' arme' li

havis:

en tajfun-nokto el torento

du ruĝgvardianojn li elsavis.

Solene l' estro donis al li la standardon

kaj ripetade diris al li je la starto.

Partio nia

senfine fidas al l' juna generacio

kreskanta sub la ruĝa flago —

al ĝi ja apartenas la estonto de l' revolucio!

Indigne la kanonoj bruis,

kvazaŭ putraĵon puŝ-detruis,

bombardis furioze l' malamikan pozicion!

Soldatoj, milicianoj prenis jen kaŭĉukboatojn

kaj remis fluge al la bordo.

Subite

truigis unu el l' boatoj kugloserio

kaj Aĉun en ondaron saltis.

Per unu man' li la standardon alte tenis,

per la alia akvon li batadis.

Jen plotonestro de l' milico haste venis,

ekkaptis lian brakon, trans ondopintojn naĝis!

Nun ili grimpis sur la rokon,

rapidis sur la sablan bordon.

Pli bravis milicianoj en batalo.

Je sturma klarion-signalo

neĝblankajn ondojn levis maro,

tremadis l' insularo,

en vento muĝis vegetaloj kvazaŭ kuris mil ĉevaloj!

Subite unu kuglo trafis

la brakon de la standardisto nia,

kaj lin turmentis pikdoloro!

Ho, l' varma sango de l' junulo li-nacia

gutadis kiel ruĝaj floroj sur la kampon de batalo,  
portante primaveron al l' antikva insularo...

Streĉante siajn fortojn, Aĉun  
sin tenis per la flaga stango,  
kaj klake flirtis la standardo super lia kapo,  
ke en la brusto bolis lia varma sango:  
“Ho, patrolando! Sangi, vivoferi pro vi  
ja estas por ni gloro kaj feliĉo de l' plej alta  
rango!

Denove Aĉun alte levis la standardon,  
antaŭen sturmis brave spite morton!  
La flagon alte tenis nova la soldato,  
kaj li ricevis de ĝi freŝan forton,  
antaŭen kuraĝigis ankaŭ la aliajn la standardo.

En brilo de l' nacia flago  
rapidis Aĉun al la malamika kazern-pordo.  
La plotonestr' milica sin proponis por bazulo  
kaj hom-eskalon formis dank' al kuna forto.  
Per tio l' flag' portiĝis ĝis dom-suproj!  
Rekruto Aĉun li-nacia  
la nigran flagon de Sajgon' per unu man' detiris  
kaj la kvinstelan ruĝan flagon li instalis per l'  
alia!

En la aŭroro sudĉinia brilis  
la alta korp' lia en helo,  
kokardoj la kolumaj kaj la ruĝa stelo...

La flag' nacia flirtis en klarionado!  
La malamikojn restajn jam ekstermis la herooj!  
La flag' nacia flirtis super Hiŝa-insularo!  
Je lev' de l' pafilar' ĝojkrioj tondris ĥore:  
La insularon la armeo kaj popolo  
defendos kaj konstruos unukore.

Flirtanta la nacia flag' imponas  
en l' orienta vento kaj ordonas,  
ke ni batalu plu por la afero!  
Tajvan-provincon ni ja nepre liberigos!  
Al ĉiu gut' da akvo, ĉiu col' da tero  
suverenecon stariĝinta la popol' praktikos!

La flag' nacia flirtas  
fiere en l' aero,  
kvazaŭ ordonas nin revolucii daŭre.  
Ni sturmas en kritiko kontraŭ Lin Biaŭ, Konfucio,  
por rompi l' malamikan sonĝon de restaŭro!

La flag' nacia flirtas!  
La flag' nacia flirtas!  
kaj sub ĝi l' Suda Ĉina Maro brilas!  
Jen zono hele verda,  
jen zono nigre blua,  
jen zono oranĝ-flava,  
jen zono freŝe ruĝa.  
Rigardu!  
La sun' leviĝas!  
La sun' leviĝas!  
Lumiĝas en ĝi Hiŝa-insularo,  
la Granda Muro en la Suda Ĉina Maro.  
Aŭskultu!

La lagoj, la riveroj kaj la maroj,  
la altaj montoj kaj la ebenaĵoj,  
la homoj de ĉiu soci-departemento  
en ĉiuj partoj de la lando  
ekĥoras per la sama kanto:  
“Ruĝas la oriento...”

\*Montaro sur Hajnan-insulo de Guangdong-provinco, Ĉinio.



# Intima rilato inter la armeo kaj popolo sur Songhua-rivero

**E**N vintro, kiam neĝas super Songhua-rivero, ĝi estas kovrita de glacio. Nur en ĝia mal-supra parto, pro enfluo de ellasita akvo de la Elektrocentraro de Hiaŭfongman, oni povas ankoraŭ veturi per ŝipo.

Estis la frosta vintro de 1973.

Post la dua horo posttagmeze de la 23-a de decembro, ligna pramo kun 20 pasaĝeroj, kroĉita al ŝtala kablo etendita trans la rivero super la akvosurfaco ĉe la pramejo de Vulagie-komunumo en la gubernio Jonggi, iris de la orienta bordo al la okcidenta, helpe de la puŝo de la fluanta akvo. Pro atako de malvarma aerondo, la temperaturo rapide malaltiĝis. Sur la rivero flosis glacioj. Kiam la pramo venis al la mezo de la rivero, flosanta glacio kelkoble pli granda ol la pramo subite puŝiĝis kun ĝi, kaj puŝis ĝin forte malsupren laŭ la riveroj, rompinte la ŝtalkingon. Oni ne plu povis manipuli la pramon kaj tiu flosis rapide laŭ la direkto de la fluo. La ses pramistoj ĉiamaniere klopodis por albordegi la pramon, sed ne sukcesis. La situacio estis tre kriza.

Informiĝinte pri tio, la batalantoj kaj komandantoj de la 7-a kompanio de iu trupo de la Popola Liberiga Armeo de Ŝenjang sur okcidenta bordo de la rivero rapidis al la loko. Kune kun kelkaj soldatoj kompaniestro Dang Ginsan rompis la glaciojn kaj provis veturigi motorboaton por treni la pramon al la bordo. Sed nemalproksime de la bordo la motorboato jam estis ĉirkaŭita de multaj glacioj, tiel ke ĝi ne povis sinliberigi. Tiam la kompanio elsendis alian motorboaton, kaj ankaŭ tiu implikiĝis en flosantaj glacioj. Poste oni elsendis du lignoboatojn, kiuj same ne sukcesis doni ian helpon.

Jam estis la 9-a horo en vespero. Frosta vento blovis en malluma nokto kun densaj neĝflokaj.

Aperis sur la rivero tavolo da glacio, tiel ke la glacioj ĉesis flosi. Pro zorgo al la pramo kaptita de glacioj sur la rivermezo, la batalantoj tre maltrankviliĝis. Por trovi vojon al la pramo kompartiano Vu Ĉangking alligis dikan lino-ŝnuron sur sian talion, kaj rampis antaŭen sur la ventro en la direkto al la pramo kun hokstango en la manoj. Kaj la membro de la Komunisma Junulara Ligo Liu Ĉenghaj sekvis lin proksime en la sama maniero. Kiam ili ambaŭ proksimiĝis al la pramo, aŭdiĝis knarado de glacioj sub iliaj kubutoj. La danĝero de falo en akvon minacis ilin en ĉiu momento. Sub la lamplumo de motorboatoj la homoj sur la pramo vidis, kiel la du batalantoj alrampis colon post colo, tute ne konsiderante pri sia sekureco, kaj ili urĝe alkriis: "Atentu, kamaradoj! Estas danĝere!" Sed la rampantoj kuraĝigis unu la alian kaj daŭre antaŭenpenis, kaj fine atingis la pramon. Post alligo de ŝnuro sur la pruon de la pramo kaj sendo de signalo al la bordo, Liu Ĉenghaj tuj helpis la plej junan knabeton en la pramo al la bordo, kaj Vu Ĉanghaj organizis la amasojn por forlasi la pramon kaj iri, unu post alia, al la bordo laŭ la vojo sur glacio helpe de la ŝnuro.

Kiam 17 pasaĝeroj jam surbordigis, subite la rivero ŝveliĝis, tiel ke la glacia surfaco de la rivero kreviĝis kaj la riverakvo inundis la glacian surfacon. Oni ne povis plu pasi sur la glacio al la riverbordo kun la helpo de la ŝnuro. Troviĝis sur la pramo ankoraŭ 3 pasaĝeroj kaj 6 pramistoj. Vidinte tion soldato Sun Ĉang-ju tuj surŝultrigis pneŭmatikan boaton kaj rapide kuris al la rivero. Li alligis ŝnuron sur unu finon de la pneŭmatika boato por ke la batalantoj sur la bordo povu retiri ĝin kaj li mem trenis ĝin antaŭen je ĝia fino alia. Li jen rampis sur glacioj jen naĝis en la akvo. Alveninte al la pramo, li unue helpis la solan virinon suriri la pneŭmatikan boaton kaj tuj laŭte kriis al la bordo: "Rapide tiru!" Li mem forte puŝis la pneŭmatikan

boaton antaŭen rampante sur glacioj aŭ naĝante en la akvo. La pasaĝerino kortuŝiĝis ĝis larmoj de lia ago.

Noktmeze, sur la rivero aperis pli granda danĝero: rapide leviĝis la akvonivelo. Oni aŭdis fajfojn de malproksima loko supre de la rivero. Glacioj interpretiĝis unuj kun aliaj formante glacian muron kun alteco de 1-2 metroj, kaj flosis svarme laŭ la fluo. Tiam la 2 pasaĝeroj kaj 6 pramistoj sur la pramo tre maltrankviliĝis, ili tuj forlasis ĝin kaj rapidis al la bordo sur flosantaj glacioj. Kompaniestro Dang Ginsan kaj vickompaniestro Liu Jujing tuj kondukis dekelkajn kunbatalantojn de la motorboato sur glaciojn por savi ilin. Subplotonestro Fang Hiaŭlin ĵus elgrimis el glacitruo kaj vidis en lamplumo, ke la 2 pasaĝeroj falis en akvon proksime de la ĉefa naviglinio de la rivero. Ne pensante pri sia propra sekureco, li rapidis al ili. Kvankam li sukcesis elsavi ilin el akvo, tamen li mem falis refoje en glacitruon. La batalantoj rapide alvenis por savi lin, sed li diris: “Ne zorgu pri mi, savu la aliajn!” Dank’ al unuanima klopodo, ili fine elsavis ĉiujn sur la pramon, inkluzive la grave frostvunditajn batalantojn Fang Hiaŭlin kaj Sun Ĉang-ju.

En la profunda nokto, la frosta vento malaltigis la temperaturon ĝis -30 gradoj C. La tramalsekigitaj vestoj de la dekelkaj soldatoj sur la pramo fariĝis glaciaj kirasoj tute rigidaj. Vide al tio, tre doloris al la pramistoj la koro. Ili tuj ekscitis la fajron pli intensa por varmigi ilin. La amasoj petis la batalantojn antaŭen pli proksimen al la fajrejo, dum la batalantoj volis cedi la lokojn al la amasoj. La maljuna pramisto Ĝen Jonghiang preferante mem suferi la froston, demetis sian vatitan veston por kovri per ĝi la grave vunditan Sun Ĉang-ju. Kiam tiu rekonsciiĝis iom post iom, li zorgeme pridemandis: “Kiel la amasoj fartas? Ĉu nenio

okazas al Fang Hiaŭlin?” Informiĝinte ke ĉiuj kamaradoj estas sekuraj, li tre ĝojiĝis kaj ekzumis sian plej ŝatatan kanton: “Prezidanto Maŭ estas la ruĝa suno en la koro de diversnacieca popolo.” La kanto kiel printempa vento varmigis la koron de la amasoj kaj batalantoj sur la pramo kaj donis al ili forton. Kun obstina revolucia volo ili persistis ĝis tagiĝo.

Frumatene de la 24-a, ili fine sukcesis surbordiĝi, post 14-hora batalado kontraŭ la flosantaj glacioj kaj rigora frostoj, sub la zorgo de diversnivelaj gvidantoj kaj la komuna klopodo de la batalantoj kaj komandantoj de la trupo kaj lokaj popolamasoj. La 20 pasaĝeroj kaj 6 pramistoj sur la pramo ĉiuj estis savitaj el la danĝero.

La informo pri la savo de pramo el danĝero, fare de la batalantoj kaj komandantoj de la 7-a kompanio rapide cirkulis en la sfero de 50 km. Popolamasoj ambaŭborde de Songhua-rivero tuj alvenis al la hospitalo kaj kazerno por vidi la batalantojn. En la daŭro de kelkaj tagoj ili ricevis pli ol 1,400 konsolajn leterojn, per kiuj multaj esprimis sian decidon nepre lerni de la batalantoj kaj komandantoj de la 7-a kompanio. Por honorigi ilian heroan faron, la gubernia partia komitato kaj la gubernia revolucia komitato de Jonggi, reprezentante la vastajn popolamasojn de la tuta gubernio, donacis al la 7-a kompanio silkan flagon kun la skribo “Kreado de nova kanto pri subteno al la registaro kaj amo al la popolo kun tuta koro kaj kompleta zorgo en servo al la popolo”.

Nun, kun alta revolucia volo, la batalantoj kaj komandantoj de la 7-a kompanio ĵetis sin en la batalon de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio por fari novajn kontribuojn en firmigo de la proleta diktaturo kaj defendo de nia granda socialisma patrolando.





# Abundaj fruktoj de la eduka revolucio

— Pri la unuaj laboristaj, kamparanaj kaj soldataj diplomigintoj de Kinghua-universitato

**P**LI ol 2,000 laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj de Kinghua-universitato, la fame konata altlernejo de sciencoj kaj inĝenierado de nia lando, jam diplomigis en ĉijara marto.

Tiuj studentoj estis elektitaj el laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de ĈPLA en la jaro 1970 dum la Granda Proleta Kultura Revolucio, post kritiko de la reviziisma eduka linio de Liu Ŝaŭki, laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ “**Studentoj devas esti elektitaj el la laboristoj kaj kamparanoj, kiuj havas praktikan sperton, kaj ili devas reiri al produktita praktiko post kelkjara studo en lernejo.**” En la lastaj jaroj ili lernis en la universitato, mastrumis ĝin kaj ludis vivfortan rolon en reformado de la universitato per Marksismo-Leninismo kaj Maŭzedongpenso. Ili atingis bonan sukceson ankaŭ en lernado. En la praktikado antaŭ finiĝo de sia lernado ili akiris abundajn fruktojn.

Ekde septembro de la pasinta jaro, sub la gvido de la kompartia komitato de la universitato kaj direktado de siaj instruistoj, kunlaborante kun pli ol cent fabrikoj kaj sciencaj kaj esploraj institucioj de la tuta lando, tiuj studentoj faris en la praktikado 366 projektojn, inter kiuj 289 estis jam aplikitaj en la ŝtata konstruado kaj 117 atingis novan nivelon en la lando aŭ ŝtopis la vakuon de nia lando en sciencoj kaj tekniko.

En la praktikado antaŭ diplomigo ili projektis grandan numeral-kontrolan il-maŝinon kun ĉina aparteco kaj subteran akvohermetikan olean cisternon, provproduktis solajn kristalojn fabrikitajn per tira metodo kaj uzatajn por substanco de grand-skala integra cirkvito, elfaris travideblan ceramikajn ŝlosilan materialon por la tria generacio de nova lumfonto, gasplenigitan betonon de ceramikaj grajnoj — la novtipan konstruan materialon kun alta forteco kaj malalta pezo, kaj projektis kaj produktis altnorman pulsaran argon-arkan veldmaŝinon, malaltbruan motoron kaj aliajn novajn

produktaĵojn. La studentoj de la fakultato de industria aŭtomatiko sukcese projektis kaj produktis aŭtomatan sistemon tute uzantan silicikontrolajn rektifilojn, kun kvar-cilindraj reireblaj malvarme premantaj laminatiloj por maldikaj kupraj strioj, kiu altigis produktokvanton je 1-oblo.

Multaj projektoj plenumitaj de tiuj studentoj en la praktikado antaŭ diplomigo estis neniam faritaj ne nur de la diplomigintoj en la pasinteco sed ankaŭ de iuj direktantaj instruistoj.

11 studentoj de iu fako en la fakultato de industria aŭtomatiko projektis kaj instalas aŭtomatan kontrolan sistemon por la Pekina Laka Fabriko, kiu ne nur plibonigis laborkondiĉojn sed ankaŭ multe reduktis laborintensecon. La laboristoj laŭde diris: “Ili ja estas studentoj de ni laboristoj.”

En tiu fabriko la interaĵo de produktaĵo de iu laborejo konstruita en 1970 estas ege venena. Pro tio estis urĝe bezonata efektivigo de aŭtomatigo en la produkta proceso por garantii la sekuron de la laboristoj. La kompartia komitato de la fabriko turnis sin al Kinghua-universitato kun peto solvi tiun problemon. Tio okazis ĝuste en la pasintjara julio, kiam la studentoj jam elektis sian temon por diplomiga praktikado kaj faris jam diversajn preparojn. La problemo de la Pekina Laka Fabriko estis ekster iliaj antaŭdestinitaj temoj. Kion fari? La studentoj de iu fako de la fakultato de industria aŭtomatiko faris ardan diskutadon. Ili diris, ke ili devas unue solvi malfacilojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj servigi la lernitajn sciojn en la universitato al ili, sed ne devas esti indiferentaj antaŭ minaco de veneno al la laboristoj. Subtenate de la gvidantoj iuj studentoj forlasis siajn jam elektitajn temojn por akcepti la taskon de la laka fabriko.

La 11 studentoj profundigis en la laborejon kaj tie laboris kune kun la laboristoj por koni teknologion ke ekzistantajn problemojn. Post kiam ili

plenumis la unuan projekton, ili kunportis ĝin al dekelkaj fabrikoj por peti opiniojn. Post tio ili revenis al la laka fabriko kaj reviziis ĝin kune kun la laboristoj kaj teknikistoj. Finplenuminte la projekton ili kune kun laboristoj faris provadon kaj instaladon. En ĉijara februaro tiu aŭtomata kontrolo instalajo sukcesis en provado en la nomita fabriko kaj oni jam komencis produkti per ĝi.

13 studentoj de la fakultato de elektra inĝenierado solvis por iu hidroelektrejo la problemon de altigo de elektrotranssenda povo per sia eksperimenta esploro, kio ebligis al la elektrejo transsendi ĉiutage elektron je 680 kilovatoj pli multe ol antaŭe en sezono abunda je akvo.

En la pasintjara junio, kiam studentoj de la nomita fakultato akceptis tiun esploran temon, iu opiniis, ke tiu temo havas nur ekonomian valoron, sed ne teoriant signifikon, malkonsentante, ke la studentoj prenis ĝin kiel objekton de la praktikado. Tamen la studentoj opiniis, ke se scienca teorio povas servi al la socialisma konstruado, ĝi estas plej valora, tial ili senhezite akceptis tiun taskon.

Tia komplika esplora temo estis neniam tuŝita eĉ de esploristoj de elektroprodukta fako antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio. Tamen, helpate de laboristoj kaj teknikistoj de koncernaj unuoj la studentoj rompis superstiĉon, timis nenian

malfacilon kaj faris per unu monato simpligitan modelon de la komplika elektra sistemo en sia laboratorio laŭ materialoj kolektitaj de la loko. Ĝoŭ Juking, studento veninta de iu elektrejo, la unua prenis sur sin la laboron de ĝenerala direktanto kaj komencis la eksperimenton. Kiam ili renkontis malfacilojn en la laboro, studentino Guo Zijong veninta de popola komunumo elmetis la problemon de racia distribuado de energioelsendo en la elektrejo kaj opiniojn pri zorgado kaj de la elsenda fino de la elektra sistemo kaj de ĝia riceva fino, kio malfermis pensojn de la instruistoj kaj lernantoj. Fine ili trovis la leĝon kaj liveris altefikan aranĝon por altigi elsendan povon de la energio. La fakto pruvis, ke tiu esplora temo havas ne nur valoron en ekonomio, sed ankaŭ kreon en teorio.

Studento de la fakultato de porakva konstruado Ĝaŭ Suheng venis de Daĝaj-brigado de Hijang-gubernio de Ŝanhi-provinco, la ruĝa flago en la agrikultura fronto de la tuta lando. Antaŭe li havis scion nur de tria klaso en elementa lernejo. Tamen la admonoj donitaj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj antaŭ lia ekveturo al la universitato ĉiam kuraĝigis lin venki malfacilojn en lernado kaj fine li sukcese plenumis la taskon de lernado.

Li studis pri povo-ekipajoj de hidroelektrejo. En la diplomiĝa praktikado li elektis projektadon

*Diplomiĝontaj studentoj de Kinghua-universitato diskutas projektojn de logikoj kaj cirkvitoj de elektronika komputero.*





de malgranda hidroelektraro de Hijang-gubernio kiel sian temon. La bezonataj scioj por projekti la elektrarojn, kiel hidrologia mezurado, projekto de kanaloj kaj dislokiĝo de fabrikoj, estis ekster de li lernitaj sferoj. Tamen en tri lernejoj li studis pli ol dek grandajn kaj malgrandajn hidroelektrarojn, kaj dank' al tio li levis sian kapablon de analizo kaj solvo de problemoj. Tial li povis relative sukcese plenumi la taskon de mezurado, elektado de tipo de hidraŭlika turbino kaj projektado de fabrikoj.


En la projektado li ĉiam konsideris la interesojn de la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezamaranoj kaj ĉiamaniere klopodis por ŝpari laborfortojn kaj materialojn. Laŭ libroj, por konstrui hidroelektrarojn estis bezonataj akvoakumula putoj kaj pompilo. Tamen vaste sorbinte opiniojn de la amasoj Ĝaŭ Suheng nur projektis kelkajn tubojn kondukantajn al kanalo de vosta akvo, per kiu oni atingis la celon de drenado. Poste li aplikis novan projekton de vertikala panela senpera kontrolado anstataŭ elektra kontrolilo nemalhavebla por elektraro. La du projektoj povas ŝpari investon de ĉirkaŭ 5,000 juanoj, kaj nun ili jam estas aplikitaj de koncerna unuo.

Kial tiuj studentoj povis atingi tiel bonan sukceson? La studentoj kaj instruistoj de tiu universitato diris, ke tio rezultas el efektiviĝo de la proletara eduka linio de Prezidanto Maŭ.

Antaŭ veno al la universitato tiuj studentoj jam spertis la tri grandajn revoluciajn batalojn, nome klasbatalon, produktan batalon kaj sciencajn eksperimentadon. Post kiam ili venis al la universi-

tato, la konfido de proletaro kaj espero de la popolo ĉiam donis al ili kuraĝigon kaj forton. En la lernejo ili persistis en studado de verkoj de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ, aktive partoprenis en diversaj politikaj movadoj kaj dank' al tio senĉese altigis sian konscion pri batalo inter la du klasoj kaj du linioj. En la diplomiga praktikado ili kritikis la rektan penson de Lin Biaŭ kaj Konfucio "fariĝi burokratoj post sukcesa sinklerigo" kaj memkonscie prenis servadon al laboristoj, kamparanoj kaj socialisma konstruado de la patrujo kiel direkton de elektado de siaj temoj. Solviĝis la problemoj de direkto, tamen estas ankoraŭ problemoj kiel vojon preni. La studentoj kritikis ankaŭ kompradoran filozofion kaj rampismon distruptitajn de Lin Biaŭ kaj Liu Ŝaŭki en disvolvado de sciencoj kaj tekniko. Ili persistis en la revolucia linio de Prezidanto Maŭ sin apogi sur propraj fortoj, pene lukti en malfaciloj, rompi supersticion, liberigi penson kaj iri propran vojon de Ĉinio en industriigo. Pro tio ili povis rompi malnovajn rutinojn kaj kuraĝe iri novan vojon en multaj sciencaj eksperimentoj.

En pli ol tri jaroj, sub la gvido de la kompartia komitato de la universitato tiuj studentoj persistis en administrado de lernejo kun malfermita pordo, starigo de rilatoj kun fabrikoj kaj fondado de fabriko en la lernejo, tiel ke instruado strikte sin kombinis kun produkta laboro kaj scienca esplorado kaj teorio kun praktiko. Tio multe levis la kapablon de analizo kaj solvo de problemoj kaj tio estas ankaŭ grava faktoro por venke plenumi multajn produktajn kaj sciencajn projektojn en la praktikado.



*Studentinoj de la duonkonduktora fako de Kinghua-universitato Ĉen Gju-ĵing (la fronta) kaj Ĝeng Ĝinĝen (la maldekstra) kune studas novan metodon de oksidado.*

# Vizito al heroaj vilaĝoj ĉe Bajjangdian-lago

**E**N somero ĉijare, ni vizitis la heroajn vilaĝojn ĉe Bajjangdian-lago. Ni ekveturis per boato de la gubernia urbo, jen sur densa lotusejo, jen tra vasta fragmitejo. Dum la veturado la maljuna boatisto fingre montris la fragmitejon kaj rakontis al ni pri multaj heroaj faroj de gerilanoj dum la Kontraŭjapana Rezistmilito.

En 1938, japanaj agresantoj surtretis Bajjangdian. Ili ĉie faris krimajn bruligon, mortigon kaj rabadon, tiel ke la vilaĝoj ĉe la lago fariĝis ruinoj. Sed antaŭ tio ne genuiĝis la laboremaj kaj bravaj popolanoj de Bajjangdian. Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ pri **“disvolvado de gerila milito en riveroj, lagoj kaj estuaroj”**, ili prenis ĉaspafilojn kaj organizis sin en geril-trupon — Janling-trupon (Vidu p. 15 n-ro 7, 1974), por batali kontraŭ malamikoj. Ŝirmate de la fragmitejoj kaj akvovegetaĵoj, ili ofte faris surprizajn atakojn al malamikoj. En matena nebulo, ili subite sieĝis surakvan apogpunkton de malamikoj kaj donis al ili grandnombran mortigon, tuj poste ili retiriĝis aplombe; en varmega somero, kun lotusfolio sur la kapo, ili embuskis malamikan ŝiparon, sin kaŝante en fragmitejo. Iutempe, por gvati malamikojn, ili sin alivestis per virina kaptuko kaj lavis vestojn aŭ riparigis fiŝreton duope aŭ triope kaŭrante ĉe riverbordo, kaj tiamaniere ili ofte faris neatenditan atakon al kelkopaj lakeoj aŭ unuopaj malamikaj ŝipoj kaj ekstermis ilin tute. Krome ili ankaŭ mobilizis vilaĝanojn por blokadi akvovojon per enakvigo de grandaj arboj, kaj detruis multajn ŝipojn de la malamiko per flosantaj minoj kreitaj de ili mem. Armite per la penso de Prezidanto Maŭ pri gerila milito, sub la gvido de la Partio, ili tiel faris la obstinan bata-

lon en kunago kun ĉefaj fortoj de la armeo, frakasis blokadon kaj forbalaadon de la malamiko kaj liberigis sian hejmlokon. Post tio, laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, daŭre disvolvante la gloran revolucian tradicion, ili rekonstruis sian hejmlokon belan kaj riĉan, per siaj laboremaj manoj. Nun nova ŝanĝiĝo jam havis lokon en Bajjangdian, multe profunda ol tiu de 40-aj jaroj.

## FAMA LANDO DE FRAGMITAJ MATOJ

Fragmito estas unu el la specialaj produktaĵoj de Bajjangdian. Ĝi povas esti plektita en maton kun diversaj flordeseĝoj, kaj ankaŭ estas bona krudmaterialo por papero. Dum militaj jaroj, la vastega fragmitejo servis kiel natura ŝirmejo de Janling-trupanoj. Iufoje, la trupanoj subakviĝis kun kava fragmittigo je la buŝo por renversi malamikan ŝipon. En la tagoj de blokado farita de la malamiko, fragmitradiko fariĝis ilia satigaĵo.

Survoje, niaj okuloj tre satiĝis per la smeraldaj fragmitoj en la tuta Bajjangdian. Iu kamarado de akvoprodukta administracio diris, ke la areo de la fragmitejoj de Bajjangdian jam atingis ĉ. 10,000 hektarojn.

Plekti maton el fragmitoj estas tutjara flankokupo de la Bajjangdian-aj popolanoj. La virinoj estas tre lertaj en mat-plektado. En ĉiu ajn vilaĝo, kiun ni vizitis, troviĝas garboj da fragmittigoj sur tegmentoj, ĉe kortmuroj kaj en draŝejoj, kaj ĉiu familio havas siajn plektantojn. Sur strateto iuj el ili premis fragmittigojn per ŝtonrulilo; aliaj dispecigis ilin per malgranda tranĉilo; kaj la triaj plektis matojn. Ĉiujare 4,000,000-5,000,000 pecoj da matoj estas ekspeditaj el tiu loko; la ŝtato tie



aĉetas grandan kvanton da fragmito, el kiu parto estas por eksportado.

Cajputaj-brigado estas unu el la vilaĝoj de Bajjangdian, abundaj je fragmito kaj matoj. Ĉar la tieaj fragmittigoj estas altaj kaj rektaj kun sandikeco, elasteco kaj maldika ŝelo, la matoj el ili estas molaj kaj blankaj. Ĉiujare la komunumanoj disvastigas la fragmitejon per plantado de fragmitidoj. La komunumanoj tiel zorgeme flegas ilin, ke vintre ili elprenis el la lago tra glaci-tavolo fekundan ŝlimon kaj per ĝi sterkis la fragmitajn kampojn; en sekeco, ili do instalas dizelon kaj pumpilon sur ŝipo kaj irigaciis altajn fragmitejojn, por ke ankaŭ ili donu pliprodukton. La enspezo de la fragmito kaj matoj okupas ĉ. duonon de la tutjara totala enspezo de la brigado. Ĉio ĉi tio signifas, ke Bajjangdian ja estas inda je la nomo "lando de fragmitaj matoj".

### DISVOLVI FIŜBREDON



Vasta akvoareo de Bajjangdian, en kiu kreskas multaj vegetaĵoj, favoras kreskadon kaj generadon de fiŝoj. La loko estas fame konata dolĉakva fiŝkaptejo en la norda parto de nia lando, abunda

je salmo, karmo, emido, astako, krabo kaj litorinoj. En longdaŭra praktikado, la fiŝistoj jam konis la vivleĝon de diversaj fiŝoj, tial ĉiujare ili povas kapti grandan kvanton da fiŝoj, astakoj kaj litorinoj, por provizo al merkato kaj eksporto. La fiŝoj kaj astakoj de Bajjangdian-lago estas tre grasaj kaj bongustaj. Ĝia plej alta jara produktokvanto atingis iam 8,850 tunojn, kaj ili havas grandan debiton en Pekino, Tiangin, Ŝanhajo, Hebej-provinco k.a.

Por kontentigi la bezonon de la ŝtato, la fiŝistoj aktive disvolvas fiŝbredadon utiligante naturajn fluejojn kaj lagetojn, tiel ke ekŝanĝiĝis la malnova produktorimedo "nur kapti, sed ne bredi". Jangĝuangĝi-brigado ĉe la lago estas la unua ekzemplo en fiŝbredado. En 1957, la brigado jam estis elektita kiel la avangarda unuo de la tuta lando en fiŝbredado. Jang Ŝutong, fiŝbreda modelo de la brigado, trifoje venis al Pekino por partopreni en la kunveno de la tutlandaj avangarduloj en akvo-produktado, kaj feliĉe vidis Prezidanton Maŭ.

La maljuna fiŝisto, kiu estis milicano siatempe dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, nun estas membro de la partia komitato de Anhin-gubernio

### *Matoplektado*



kaj vicsekretario de la partia filio de la brigado. Kvankam li jam estas 72-jara, tamen ankoraŭ havas ardan revolucionan energion. En la lastaj 20 jaroj post la Liberiĝo, li ĉiam diligente faris fiŝbredadon; en la kvar sezonoj, ĉu en vento aŭ en pluvo, li klopodas por kolekti freŝajn herbojn por fiŝoj; ĉiutage li mezuris tri-foje akvan temperaturon kaj periode freŝigis la fiŝbredejojn per nova akvo. Somere, kiam fiŝidoj ne havas bonan apetiton pro varmego, li do konstruis budon super la akvo ĉe la bredejo kaj metis tie verdajn delikatajn herbojn; vintre, kiam la lago glaciigis, li faris truojn sur glacio por evitigi morton al fiŝoj pro manko de oksigeno, malgraŭ frosta vento. En iu somero okazis inundo, tial li gardis la fiŝbredejojn tagnokte. Por ke la fiŝoj ne forkuru, li malkonstruis siajn du vakajn ĉambrojn kaj uzis la lignon kiel materialon por firmigi barilojn de la bredejo. Dank' al la diligenta laboro de li kaj liaj kolegoj de la fiŝbreda grupo, pli kaj pli prosperiĝis la fiŝbredado de la brigado. En la lastaj du jaroj, ili jam akiris pli novan atingon en kulturado de fiŝspecoj, sinapogante sur la propraj fortoj.

*Anasaro de Vanggiĝaj-brigado*



Sub la iniciato de la revolucia komitato de la gubernio, ilia sperto pri fiŝbredejo estis disvastigita tra la tuta gubernio. Nun tie troviĝas la ŝtataj fiŝbredejoj, kaj la plejparto de la komunumoj kaj brigadoj de Bajjangdian havas sian propran fiŝbredan bazlokon, multaj el ili konstruas novajn fiŝbredejojn por pli vastigi fiŝbredan areon kaj disvolvi fiŝbredan aferon.

### ABUNDAJ FRUKTOJ AKIRITAJ PER SIAJ FORTOJ

Bajjangdian kuŝas en malsupra parto de 9 riveroj. Tial sedimento en multaj jaroj levis la lag-fundon ĝis super la ternivelon de ĉirkaŭaj vilaĝoj kaj kampoj. En pluvoza sezono ĝia akvo superbordiĝis kaj ofte inundis kampojn kaj vilaĝojn. Dum la vizitado, ni aŭskultis multe da plendoj de fiŝistoj pri malfeliĉa vivo en la malnova socio okaze de superakva katastrofo. Li Jonghong, fiŝisto-poeto de Bajjangdian, deklamis por ni versaĵon pri tiama amara vivo:

*Amaras la fiŝistoj mizerplenaj,  
kvazaŭ la larm' kun gencianoj bolas.  
Kaj ĉiam ĝis la krepuskiĝ' matena,  
haŭlistoj krias kaj infanoj ploras.*

*Amaras la fiŝistoj mizerplenaj,  
loĝejon eĉ ne havas laboremaj,  
jen nokte kaŭras en la templ-salono,  
en tag' almozas ja de dom' al domo.*

Post la Liberiĝo, por ke Bajjangdian ne trafu plu inundon, la Partio kaj la ŝtato konstruigis 7 grandajn kaj mezgrandajn akvorezervejojn sur la supra parto de tiuj riveroj, kaj diluvodrenajn konstruaĵojn ĉe la malsupra parto, el kiuj la grandioza kluzo de Ĝaŭlinguang havas drenan kapablon je 4,200 kubmetroj po sekundo. Samtempe la popolanoj de Bajjangdian ankoraŭ altigis kaj larĝigis kontraŭinundan digon je centoj da kilometroj longan kaj konstruis 11 grandtipajn pump-staciojn. Tiuj konstruaĵoj fundamente evitigis al tiu regiono superakvon kaj kreis favorajn kondiĉojn por Bajjangdian en ĝia disvolvado de agrikulturo. En la pasinteco, la konsumata greno de tiu akvoprodukta regiono estis ĉefe liverita de la ŝtato. Sed en la lastaj jaroj, disvolvante la spiriton de sinapogo sur la propraj fortoj kaj penema lukto kontraŭ malfaciloj, la popolanoj akiris evidentan atingon ankaŭ en grenoprodukto. Nun la bezonata greno de la brigado estas fundamente memprovizata. La totala kaj po-mua produktokvantoj de greno kreskis respektive je 4-oblo kompare kun tiuj antaŭ pli ol dudek jaroj.



En Cajputaj-brigado, ni vidis teraskampojn, sur kiuj la plantaĵoj sin montris aparte prosperaj. La estro de la revolucia komitato de la brigado diris al ni, ke antaŭ ok jaroj ĉi tie restis ankoraŭ marĉo. Dum la alta tajdo de **“lerno de Daĝaj en agrikulturo”**, komunumanoj elmetis la sloganon ŝanĝi la marĉon en grendonan kampon. Tiutempe, sub la direkto de Hju Ĝengong, estro de la komunumo, la sturma taĉmento kun gejunuloj kiel ĉefa forto venis al la multjare dorminta marĉo. Sub la kuraĝigo de sindediĉa spirito de gerilanoj en militaj jaroj, ili staris en malpura ŝlimo profunda je pli ol unu futo kaj persistis en elfosado de la ŝlimo por konstrui teraskampon, timante nek malpurecon, nek lacon, nek malvarmon. En tiu laboro partoprenis ankaŭ maljunuloj kun aĝo de 50-60 jaroj kaj knaboj de kelk-jaraj. Post la malfacila penado de du vintroj kaj du printempoj, 48 pecoj da orde vicigitaj teraskampoj estis formitaj sur la marĉo, kies totala areo atingis 54 hektarojn. Nun, la brigado havas memprovizon de greno, same kiel aliaj brigadoj de Bajjangdian.


Pene produktante grenon, la popolo de Bajjangdian donis atenton ankaŭ al forstumado, plantado de lotus-rizomoj kaj trapoj, disvolvo de anasobredoj kaj aliaj flankokupoj. En Bajjangdian, kie troviĝis malmulte da arboj en la pasinteco, nun verdas ombraj arboj kaj flirtas plorsalikoj en vicoj ĉu en vilaĝoj aŭ sur digoj. Ĉiujare granda kvanto

da lotus-rizomoj, trapoj, anasoj kaj anasovoj estas liverita al la ŝtato. Inter aŭtuno kaj vintro, fiŝistoj kun pafilo boatveturis por ĉasi sovaĝajn anserojn, anasojn kaj aliajn birdojn. Bajjangdian ŝanĝiĝas en riĉan akvolandon kun multflanka produktado.

## VERA MASTRO DE LA ŜTATO

Iun sunbrilan matenon, ni veturis per boato al Guolikoŭ-vilaĝo, kie aktivadis Janling-trupo siatempe. Tuj enirinte en la vilaĝon ni vidis rektan asfaltitan straton kaj akvoturon. Oni diris al ni: “Tio estas atesto de la feliĉa vivo en la nova socio!”

En la malnova socio, la stratoj de Bajjangdian kotiĝis post pluvo; malpura akvo kun fekaĵoj fluis en la lagon, el kiu oni tamen ĉerpis trinkakvon. Pro tio epidemiis enterito, malario kaj multaj infektaj malsanoj. Post la Liberiĝo la ŝtato investis apartan sumon por fosi profundan puton en ĉiu vilaĝo de Bajjangdian, tiel ke la vilaĝanoj povas trinki puran akvon. Maljunuloj diris al ni: “Rigardu, nun la necesejoj kaj stratoj estas purigataj de specialaj homoj, kaj la akvokondukilo jam disetendiĝis ĝis ĉies domo. Ĉiu familio havas elektrolampojn kaj loĝas en nova domo; kaj oni preparas farunon per muelmaŝino. Ho, la nova kaj malnova socioj estas kvazaŭ ĉielo kaj infero!”



*Jang Ŝutong interŝanĝas sperton pri fiŝbredado kun junuloj.*



Fakte, la supre menciita estas nur parto el la tuta ŝanĝiĝo. La pli profunda ŝanĝiĝo, kiun ni vidis dum la vizito, estas tio, ke la popolo de Baj-jangdian, sate suferinta amaran vivon en la malnova socio, nun jam fariĝis mastro de la nova socio. La familio de Ĉe Hiangĉun estas bona ekzemplo en tiu flanko.

Kiam Ĉe Hiangĉun estis ok-jara, li fuĝis en Tiangin sekvante siajn gepatrojn. Post nelonge lia patro estis rekviziita de la japanaj agresantoj, postlasinte ses familianojn. Lia pliaĝa fratino fariĝis ĉifonistino kaj li mem almozulo vagante kun sia avino. Pli poste, la avino kaj plijunaj gefratoj ĉiuj mortis de malsato kaj malsano, tial la patrino devis reveni kun li kaj lia pliaĝa fratino al la hejmloko. Nelonge post tio ankaŭ la patrino estis mortigita de Kuomintango. Por enterigi la patrinon la pliaĝa fratino sin vendis, kaj li tamen estis perforte rekrutita de Kuomintango. Poste, pro la neeltenebla subpremado de Kuomintango, li transiris al la liberiga armeo, kie li aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Hejmen reveninte post la demobilizo, li estis elektita de la komunumanoj kiel estro de la produkta grupo. Dum la granda kultura revolucio li estis promociita kiel la sekretario de la partia filio de la brigado kaj estro de ĝia revolucia komitato. Li ĉiam laboras kune

kun la komunumanoj, tial li ĝuas bonan reputacion inter la amasoj. Lastjare, lia familio ricevis 1,850 kilogramojn da greno kaj pli ol 1,000 juanojn, kaj vivas feliĉe. Li diris al ni, ke el la membroj de la revolucia komitato de la brigado, krom unu kadro deveninta de mezkampana familio, ĉiuj aliaj estas devenintaj de la malriĉkampana familio, el kiuj triono, kiel li, estis dungitoj ĉe bienuloj aŭ almozuloj. En la komunumoj de ni vizititaj, plejparto de la ĉefaj gvidantaj kadroj de komunuma, brigada kaj produktgrupa niveloj estas malriĉaj kamparanoj subpremitaj de bienuloj kaj fiŝtiranoj en la malnova socio, aŭ iliaj gefiloj. Kun la konfido de la amasoj ili tenas en la mano regpotencon de diversaj niveloj en la kamparo, kio ebligis al tiu loko profundan ŝanĝiĝon.

En la lastaj jaroj Guolikoŭ-brigado havis rapidan disvolviĝon en agrikulturo kaj flankokupoj. Kaj la enspezo de la komunumanoj plimultiĝas jaron post jaro. Ĉiumonate la komunumanoj povas ricevi certan kvanton da kontanta mono kaj distribuon monon post jarfina konto. Kiu povis imagi, ke la almozuloj en la malnova socio hodiaŭ povas ricevi monon ĉiumonate kaj havas deponitan monon en la banko?

Antaŭ ok jaroj, en tiu loko troviĝis nur malgranda agenta butikoj, sed nun nova magazeno



estas de ili mem konstruita, en kiu estas vendataj pli ol 4,000 specoj de komercaĵoj. La sumo de ĉiutage venditaj varoj estas 10-oblo de tiu antaŭ ok jaroj.

Antaŭ la Liberiĝo, tieaj fiŝistoj ofte havis multajn ŝuldojn pro katastrofo, edziĝo, morto, malsano kaj kriplesco, kio tute perdis al iliaj familioj vivrimedojn. Tamen nun ili ne plu estas pelataj de tio, ĉar la brigado posedas la bonstatigan fonduson uzatan por la kooperativa kuracado, por starigo de liceaj kursoj en elementaj lernejoj, por helpo al familioj de revoluciaj armeanoj kaj martiroj, al maljunuloj perdintaj laborkapablon, vidvoj kaj vidvinoj, por vivtenado de la familioj, kiuj havas multajn mem-

brojn, sed malmultajn laborfortojn, aŭ kiuj havas ŝuldon al publiko pro malsano, sed ne kapablas repagi. Ni vizitis komunumanon Deng Kiuŝeng. Lia familio havas multajn membrojn, sed malmultajn laborfortojn. Antaŭ kelkaj jaroj, pro gravega malsano, li prunteprenis de la brigado pli ol 1,000 juanojn. Konsiderante lian malfacilon, la komunumanoj konsentis, ke la brigado elpagu el la fonduso la ŝuldon anstataŭ li. Li diris plenemocie: “Mi ja devas danki la Partion kaj Prezidanton Maŭ, danki la komunumanojn. Se ni restus ankoraŭ en la malnova socio, niaj familianoj certe disfuĝus aŭ mortus!” Dank’ al tio, ke la vivo de la komunumanoj havas fideblan garantion, ili ĉiuj, kiel mastroj, energie laboras en la socialisma konstruado.

# “Geniismo”

## — ĉarlatana trompaĵo


de Su Guangming, tutlanda  
industria labormodelo

**K**ONFUCIO distrumpetis ideisman “antaŭdestinisman” dirante: “la ĉielo dotis min per virtoj”, kaj ke li estas “sanktulo”, kiu “scias ĉion denaske”. Lia fidela disĉiplo Lin Biaŭ, la burĝa karieristo, konspirulo, duvizaĝulo, renegato kaj naciperfidulo, taksis sin kiel “ĉielan ĉevalon” kaj energie kolportis la tezon de “geniismo”, kiu estas nenio alia ol kopiaĵo de “antaŭdestinismo” de Konfucio, kaj la ambaŭ ismoj, unu kiel la alia, estas nur ĉarlatana trompaĵo.

En la malnova socio, mi laboris por kapitalisto, spertante ĉian suferon de ekspluato kaj subpremo kaj estis analfabeta senklerulo. Post la Liberiĝo mi fariĝis mastro de la ŝtato kaj, dank’ al la kulturado de la Partio, mi akiris legoscion. Mi legis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj ekkonis, ke en la mondo ne ekzistas “geniulo”, kiu “scias ĉion denaske”. Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“La korektaj ideoj de la homo nur povas veni de socia praktiko, de produkta batalo, klasbatalo kaj scienca eksperimento — la tri tipoj de praktiko de la socio.”** El mia multjara sperto en produktado mi ekkomprenis, ke vera scio venas de praktiko,

kaj kapablo — de batalo. Ĉia scio, kapablo kaj sperto, ĉia renovigo kaj kreo en produktado ne venas de la ĉielo, nek ekzistas dekomence en la homa cerbo, sed venas kiel rezulto el longtempa ripetada praktiko. Mi estas frezisto kaj la maŝino, kiun mi uzas, estas importita en 1928. Ĝi funkciis kun malalta efiko kaj malbona kvalito. Mi foje kaj refoje studis la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko*, kaj sub la direkto de la filozofia penso de Prezidanto Maŭ kaj kun la helpo de miaj gvidantoj kaj kolegoj, de 1950 mi faris okfoje reformojn al la maŝino kaj aldonis pli ol 100 novajn maŝinpecojn kaj turnis ĝin en altrapidan il-maŝinon. Per tiu mi finis mian taskon difinitan laŭ la Unua Kvinjara Plano antaŭdate je 23 monatoj, kaj tiun de la Dua Kvinjara Plano je 32 monatoj. Antaŭe en nia fabriko, du laboristoj devis pene marteladi ĉiutage de mateno ĝis vespero por fari truojn, tamen tute ne povante kontentigi la produktajn bezonojn. Poste mi kaj kelkaj laboristoj kaj teknikistoj pristudis la aferon, kaj post multfoja provado sukcesis konstrui truigan maŝinon, per kiu unu homo povas plenumi en unu tago laboron, por kiu oni bezonis antaŭe tutan monaton.

*Aŭtoro de la artikolo  
Su Guangming (la me-  
za) studas teknikan  
renovigon kune kun  
aliaj laboristoj*



De pli ol 20 jaroj mi faris kune kun laboristoj kaj teknikistoj 330 teknikajn renovigojn. Ĉiujn tiujn sukcesojn ni ŝuldis ne al ia “genio” aŭ “inspiriĝo”, nek al cerbumado en fermita kabineto sur bazo de nenio, sed nur al longtempa observado, ripetada provado kaj multfoja eksperimentado kun malsukcesoj. Prezidanto Maŭ diris: **“Por ricevi korektan konon, ofte necesas ripeti plurfoje la proceson de materio al spirito kaj de spirito al materio, t.e. de praktiko al kono kaj de kono al praktiko.”** Lin Biaŭ plenforte kriaĉis ĝisraŭke, ke “oni ne povas ne agnoski geniulon”, kaj ke la kapablo de homo estis “dotita de la ĉielo”. Tio estas pura babilajo.

Prezidanto Maŭ diris bone: **“Popolo, nur la popolo, estas la movforto kreanta la mondan historion.”** Kiu kreis la historion de la homa socio? Ĉu “geniuloj”, “herooj” aŭ “sanktuloj”? Ne, tute ne. Ni klare scias: Ne la Cezaro, nek la dia volo la savon portos de la tirano, liberon donos al popolo nur ĝia propra forta mano. El produktaj laboroj kaj teknikaj renovigoj dum multaj jaroj mi profunde komprenas: Saĝo de unu homo estas limigita, sed saĝo de amasoj estas neelĉerpebla. Prenu la ŝanĝiĝon de nia Harbina Lokomotiva kaj Vagona Fabriko post la Liberiĝo kiel ekzemplon. Nia fabriko havas la historion de 75 jaroj. En februaro de 1950 nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ inspektis nian fabrikon; tio donis al la tuta fabriko gigantan kuraĝiĝon kaj edukon. De pli ol 20 jaroj, sub la direktado de la proleta revo-

lucia linio de Prezidanto Maŭ, ni laboristoj kun amo kaj respekto al la granda gvidanto rompis superstiĉojn, liberigis la penson, apogis nin sur propraj fortoj, peneme batalis sub malfacilaj kondiĉoj, kaj multe faris teknikajn renovigojn kaj reformojn. Ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio sole, la tuta fabriko plenumis 435 teknikajn renovigojn kaj reformis 70% el pli ol 200 malnovaj ekipaĵoj de kvardekaj jaroj. Krome ni projektis kaj konstruis pli ol 40 precizajn il-maŝinojn por specialaj celoj, konforme al la bezonoj de disvolvado de la produktado. Dank’ al Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso kaj multjara diligenta laborado, konscienca kaj lerta, sub malfavoraj kondiĉoj, ni laboristoj, kiujn Lin Biaŭ kaj Konfucio rigardis kiel “malsuperajn stultulojn” kaj “malnoblulojn”, transformis la malgrandan, malnovan kaj kadukan fabrikon en relative grandan evoluintan.

La energia predikado pri “geniismo” fare de Lin Biaŭ havis insidan celon nur por krei publikan opinion favoran al lia intrigo uzurpi la gvidadon de la Partio kaj restaŭri kapitalismon. La teoria programo “geniismo” de Lin Biaŭ servis rekte al lia reakcia politika programo “sinregi por restarigi la etiketon”. Helpe de la “mikroskopo” kaj “magia detekto-spegulo” de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso ni laborista klaso travidis la insidan ambicion kaj reakcian esencon de Lin Biaŭ.



# Kritiko pri la reakcia tezo de Konfucio kaj Lin Biaŭ ke “superuloj estas saĝaj kaj malsuperuloj stultaj”

de LIANG ĜISAN, maljuna laboristo de  
la Termoelektra Centralo de Maŭming,  
Guangdong-provinco

ANTAŬ 2,000 jaroj Konfucio, apostolo de reakciaj sklavposedantoj, energie distrumpetis pri “ĉion-scio denaska”, ke “ne ŝanĝebla estas nur tio ke superuloj estas saĝaj kaj malsuperuloj stultaj”, k.s. absurdaĵojn, asertante, ke la sciojn posedas la homoj kun naskiĝo, ke la “saĝeco” kaj “stulteco” de la homoj estas donitaj de la ĉielo, kaj ke la regantoj estas plej “saĝaj”, dum la popolamasoj “stultaj” kaj postrestintaj. Lia intenco estis deradike nei, ke la popolo estas movforto de la monda historio, kaj oponi kontraŭ socia reformo por restarigi la reakcian regadon de sklavposedantoj. La burĝa karieristo, konspirulo Lin Biaŭ prenis tiun rubaĵon el la paperkorbo de Konfucio por elfari la reakcian “geniismon” kiel sian teorian programon por uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj restaŭri kapitalismon. Unuflanke li ŝminkis sin kiel “geniulon”, “ĉielan ĉevalon” kaj “la plej superan” superhomon, kaj aliflanke kalumniis, ke la laboristoj

kaj kamparanoj pensas, parolas nur “kiel akiri monon kaj rizon”, pri “siaj edzino kaj infanoj”, gratulas reciproke nur pro “riĉiĝo” kaj “akiro de riĉaĵo kaj trezoro”, do ili estas nur “stultaj popolanoj”. Konfucio distrumpetis ke “superuloj estas saĝaj kaj malsuperuloj stultaj”, Lin Biaŭ kalumniis la amasojn kiel “postrestintajn”, ili ambaŭ havis la ideologion de ideisma transcendentalismo. La unua klopodadis por restaŭri sklavsystemon, kaj la alia intencis restaŭri kapitalismon, ili ambaŭ estis reakciuloj en politiko, kiuj konspiris por restaŭro kaj por retroirigi la historion. Lin Biaŭ estis centpocenta disĉiplo de Konfucio.

Kiuj estas finfine la kreintoj de la historio? Ĉu “sklavoj” aŭ malmultaj “herooj”? Tio estas la fokuso de la batalo inter la ideisma kaj materiisma konceptoj pri la historio. Prezidanto Maŭ instruis al ni, ke “popolo, nur la popolo, estas la movforto

*Kunveno por kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio, okazigita  
en laborejo de Hinhua-presejo de Giangsu-provinco*



**kreanta la mondan historion**". En la historio de pli ol 50 jaroj de nia Partio, plena de bataloj, serio da pripensindaj problemoj prezentiĝas al ni: Kial la ekstreme ferocaj japanaj imperiistoj fine kapitulacis al la ĉina popolo? Kial ni povis venki la 8-milionan ĝisdente armitan armeon de Ĉiang Kajŝek per fusilo plus milio? Kial fluge disvolviĝas la socialisma afero post la fondiĝo de la nova Ĉinio? Ĉion ĉi tion ni ŝuldas al Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, kiuj mobilizis per Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso la **"milionojn da laboristoj kaj kamparanoj al unuanima batalo"**. Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ili sindone batalis kontraŭ malamikoj kaj venkis grandajn malfacilojn. Ĉu ili celis en tio "riĉecon"? Ne, absolute ne! Ili batalis por renversi la tri grandajn montojn sur sia dorso, por konstrui novan prosperan Ĉinion, por ke la tutmonda popolo havu feliĉan vivon sen subpremo kaj ekspluato. La peniga batalo de la popolo puŝas la socion al disvolviĝo, jen estas la historia fakto. Sed Lin Biaŭ inversigis ĝin, alproprigante la meritojn de la popolo al si. Kaj tio ĝuste malkaŝis lin mem kiel burĝan karieriston kaj konspirulon enŝteliĝintan en la revolucian vicaron.

Prezidanto Maŭ instruis al ni, ke **"ni devas fidi la amasojn, ni devas fidi la Partion — tio estas du fundamentaj principoj"**. En praktikado ni spertis, ke Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio plej fidis la popolon, la revolucia linio de Prezidanto Maŭ koncentre enkorpiĝis la fundamentajn interesojn de la popolo, dum la popolo varme amas kaj subtenas Prezidanton Maŭ kaj la Partion. Kiel Prezidanto Maŭ instrukas, tiel la popolo sekvas. Ni prenu la laboristojn de nia centralo kiel ekzemplon. En 1958, sub la direkto de la tri ruĝaj flagoj kaj la instrukcio de la Partio, ni venis de diversaj lokoj de la lando al la monto Lejgongling de Maŭming, por konstrui tie la unuan altpreman kaj alttemperaturan termoelektran centralon de Guangdong-provinco. Sed, pro sia furioza opono kontraŭ Ĉinio, la sovetuniaj reviziistoj publike perfidis siajn promesojn, disŝirante la kontraktojn subskribitajn inter Sovetunio kaj Ĉinio kaj revokante siajn specialistojn laborantajn en Ĉinio. Ili pensis, ke pro tio la konstruado de la centralo ĉesos sen rezulto, kaj Lejgongling denove kovriĝos per sovaĝaj herboj. Fronte al la malfaciloj ni elektristoj pensis ne pri "la edzino kaj infanoj", nek pri "oleo, salo, saŭco, vinagro kaj brulligno" aŭ pri "akiro de riĉaĵo kaj trezoro" k.s., sed alte levis la standardon de Prezidanto Maŭ, nome: "sendependeco kaj memdecido" kaj "sinapogo sur propraj fortoj", kredis je



*Laboristoj de Tiangin-a Bicikla Fabriko kritikas la reakcian tezon de Lin Biaŭ kaj Konfucio pri "superuloj estas saĝaj kaj malsuperuloj stultaj".*

praktiko, sed ne je "geniuloj", klopodis por venki ĉiujn malfacilojn kaj plue konstrui la elektran centralon. Sub la intima zorgado de la Centra Komitato de la Partio, estrata de Prezidanto Maŭ, la necesaj ekipaĵoj por kompletigi la centralon venis de diversaj lokoj de la lando al Maŭming unu post alia, tio tre multe kuraĝigis nian batalvolon. Ni disvolvis nian revolucian spiriton, apogis nin sur la saĝo de la kolektivo kaj venkis malfacilojn unun post alia. Post malpli ol unu jaro la centralo ekfunkciis kaj komencis elsendi potencon kurenton, per tio ni frakasis la intrigon de la sovetuniaj reviziistoj intencantaj strangoli nin.

Dank' al la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, ni laborista klaso pluapaŝe vidas nian forton kaj firme kredas, ke **"en iu senco, la plej saĝa, plej talenta estas batalanto kiu havas plej multan praktikan sperton"**. En la lastaj du jaroj ni faris serion da teknikaj renovigoj, tiel ke la elektroprodukta kapablo de la centralo kreskis per 30% kaj ni ĉiujare superplenumis la ŝtatan planon.

De Konfucio ĝis Lin Biaŭ, ĉiuj reprezentantoj de reakciaj regantaj klasoj en la historio estis homoj kun "mallaboremaj membroj kaj ne povantaj distingi la kvin grenojn". Ili povoscias nek konstrui maŝinojn nek kulturi teron; sen ni laboristoj kaj kamparanoj, restus al ili nur morti de malsato kaj frosto! Ili absolute ne estas iaj "geniuloj", sed plej grandaj stultuloj kaj simplaj parazitaj.



# “Antaŭdestinismo” estas spirita

## hommortiga glavo

de malriĉkamparanino SONG JUĜEN

**K**ONFUCIO distrumpetis, ke “vivon kaj morton destinas la sorto; riĉecon kaj noblecon decidas la Ĉielo”. Li diraĉis, ke sklavoposedantoj subpremas kaj ekspluatas sklavojn, ekspluataj klasoj tiranas laborantajn popolanojn, tio estas decidita de la Ĉielo, kaj ke sklavoj kaj laborantaj popolanoj suferas de mizeroj, tio estas difnita de la sorto. Lin Biaŭ rigardis sin kiel denaskan “plej noblan” kaj nedisputeblan reganton, sed rigardis laboristojn kaj kamparanojn kiel plebanojn “abisme diferencajn” de li, tial li pretendis, ke ili estas destinitaj al lia regado. Tio esence neniom diferencas de la reakcia ideologio de Konfucio kaj Mencio. Mia persona travivaĵo estis senkompata kritiko kontraŭ la reakcia ideologio de Konfucio kaj Lin Biaŭ.

La suferoj de ni malriĉuloj en la malnova socio

estis pli amaraj ol vermo kaj galo. Mia hejmvilaĝo estis en Ĉangge-gubernio de Henan-provinco. Mia familio havis ses membrojn, tri ĉambrojn kaj kelkajn muojn (1 muo = 1/15 hektaro) da sterilaj kampoj. Sed ankaŭ tiel malgrandan posedaĵon avidis la bienulo en la vilaĝo. En la jaro 1934, la bienulaĉo kaj la centfamilia estro en komplotado forsendis mian fraton aliloken labori kiel kulio. Tiam mia familio estis tre malriĉa kaj ofte malsatis, do de kie li ricevu vojaĝkostojn? En senlirejo mia patro vendis la teron kun larmoj. En malpli ol ses monatoj, mia frato sesfoje laboris kiel kulio, tial niaj tri ĉambroj kaj la sterila tero ĉiuj estis forrabitaj de la bienulaĉo. Mia patro kun granda indigno mortis de malsato kaj malsano. Post tio nia vivo fariĝis pli mizera. Mia patrino kun larmoj forvendis



*Laborantoj kaj studentoj de la Fugian-a Instruista Universitato, naskiĝintaj en Tajvan-provinco, studas dokumentojn pri kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio.*

miajn du fratinojn. Sub la kruela subpremado kaj ekspluatado de bienuloj, kapitalistoj kaj kuomintangaj reakciuloj, mia unua fratino, mia dua fratino kaj ties edzo kaj knabo ĉiuj mortis de malsato.

En la malnova socio mi baraktis kontraŭ la morto. Kiam mi edziniĝis, la familio de mia edzo havis 5.5 muojn da sekeca tero. Ni ambaŭ pene laboris kaj apenaŭ vivtenis nin. Tiam, impostoj de Kuomintango estis tre multaj. La reakciuloj devigis nin pagi impostojn per skurĝo kaj punoj. Ni povis nur lombardi teron al bienulo por pagi impostojn. Je malpli ol unu jaro post tio, la bienulaĉo devigis nin reaĉeti la lombarditan teron, kiam mi estis en malfacilo. Ni ne havis la monon por reaĉeti, kaj mia edzo povis nur vendi sin al armeo. Post nelonge mia edzo dizertis, sed li saltis el la pato en la fajron — li estis kaptita de japanaj diabloj kiel senpaga servisto. Pro pezega laboro li grave malsaniĝis. Poste lia malsano pli kaj pli graviĝis kaj ne povis moviĝeti kuŝante en la lito. Mi laboris kiel taglaboristino, kaj plenigis la stomakon per herboj, arboŝeloj kaj arbofolioj. Tiam ni ambaŭ ofte ne povis endormiĝi pro malsato. Iuvespere, pro malsato mia edzo jen barakte sidiĝis, jen malrapide kuŝiĝis, senĉese lamentante: “En tiu obskura socio ni malriĉuloj jam ne povas vivi plu!” En la malnova socio, la malriĉuloj, same kiel ni, estis nenombreblaj kiel la steloj en la ĉielo. Ĉu nia sorto estis destinita al mizero? Ne, tion kaŭzis la malnova hommanĝa reĝimo.

Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, ni faligis bienulojn, distribuis iliajn kampojn, frakasis la malnovan ekspluatatan sistemon. Poste, ni organizis nin en kooperativon, starigante socialisman kolektivan posedantecon. Ni malriĉuloj liberiĝis kaj fariĝis mastroj de la ŝtato, kaj nia vivo boniĝas tagon post tago. Nun nia familio kun tri membroj loĝas en nova domo. Ni havas kvar kolorajn litkovrilojn kaj sufiĉan kvanton da vestaĵoj. Vespere la domon lumigas elektra lampo. Pro hodiaŭa feliĉa vivo mi sentis brustokrevan ĝojon. En la jaro 1968, min trafis malsano, kiun

mi opiniis nekuracebla. Sed mi resaniĝis dank’ al zorgo kaj helpado de la Partio kaj la popola registaro. Nun mi estas pli forta ol antaŭe. Se tio okazus en la malnova socio, mi jam frue pereus.

Kie kuŝas la kaŭzo ke mi estis mizera en la malnova socio, sed feliĉa en la nova? Ĉu mia sorto ŝanĝiĝis? Ne, tute ne. Ni rigardu ekzemple la bienulon de nia brigado. Antaŭ la liberiĝo, li konstante fanfaronis, ke li havas “fortunon” kaj “bonan sorton”, dum li insultis jardungitojn, ke “la sorto destinas al ili nur duonlitron da rizo, tial ili neniam povos akiri unu plenan”. Post la Liberiĝo, ni faligis lin, distribuis liajn kampojn rabiste akiritajn de kamparanoj kaj praktikas diktaturon super li. Kien lia “fortuno”? Estas kristale klare, ke riĉecon aŭ malriĉecon decidas ne la Ĉielo, nek la sorto, sed la socia sistemo. En la malnova socio ni malriĉuloj vivis en sufero kaj mizero pro kruela subpremado kaj ekspluatado de la bienula klaso. Hodiaŭ ni fariĝis mastroj de la ŝtato, feliĉe vivas dank’ al tio, ke la proletaro tenas regpotencon kaj starigis socialisman sistemon sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio.

Konfucio el la tutaj fortoj kriaĉis, ke “vivon kaj morton destinas la sorto; riĉecon kaj noblecon decidas la Ĉielo” por ke sklavoj obeeme toleru subpremadon kaj ekspluatadon de sklavoposedanta klaso kaj por ke la reakcia regado de sklavoposedantoj-aristokratoj daŭru. Tio tute estas spirita hommortiga glavo de sklavoposedantoj kaj opio venenanta laborantajn popolanojn. La burĝa karieristo, konspirulo Lin Biaŭ heredis la spiritan glavon de sklavoposedantoj, ŝminkis sin en denaskan “plej noblan” “geniulon”, tio estas nenio alia ol fabriki publikopinion por lia uzurpo de la plej alta potenco de la Partio kaj la ŝtato, por fondo de hereda faŝisma feŭda dinastio de Lin-familio. Lia ambicio estis restarigi al bienuloj kaj burĝoj la perditan paradizon kaj devigi laborantajn popolanojn obei al ilia regado kaj denove suferi la mizerojn spertitajn en la malnova socio. Ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj absolute ne lasos tion efektiviĝi!





# Malgranda materialo por kritikado kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio

## “SCII ĈION DENASKE”

“Scii ĉion denaske” signifas, ke la scioj kaj kapabloj de homoj ekzistas apriore. Tio estas reakcia penso distrumpetita de Konfucio. En la libro *Lun Ju* Konfucio diris: “Kiuj scias ĉion denaske, estas la superaj; kiuj scias post lernado, estas duavicaj; kiuj lernas kun malfaciloj, estas en pliposta vico; la popolanoj, kiuj ne lernas antaŭ malfaciloj, estas la malsuperaj.” Tio signifas, ke kiuj scias ĉion denaske, estas la superaj, dum la aliaj estas malsuperaj. Laŭ Konfucio la superaj, kiuj scias denaske, posedas sciojn kaj kapablojn jam en la utero de siaj patrinoj. Ili estas denaskaj “sanktuloj” kaj “bonuloj”, nome tiamaj sklavposedantoj-nobeloj. Kaj homoj de la alia speco estis denaske sensciaj stultuloj kaj malsuperuloj, al kiuj tute mankis scioj, nome la laboruloj kaj sklavoj siatempe. Tiu ĉi absurda aserto de Konfucio estis plene saturita de hierarkia ideo de sklavposedantoj-nobeloj; kaj tute ignoris la fakton, ke la sklavoj kreis la historion. Ĝi estis tre reakcia koncepto.

Lin Biaŭ propagandis la geniismon de “ĉionscio denaska” de Konfucio, kaj babilaĉis, ke iuj “scias ĉion denaske”, “komprenas ĉion denaske” kaj “povoscias ĉion denaske”. Li plie fanfaronis: “Mi posedas bonan kapon malsaman ol tiu de la aliaj; ĝi funkcias kun aparta efikeco. Nu kion fari? Ĝi ja estas donita de la gepatroj.” Ja vere kulminas la senhonteco, absurdeco kaj reakcieco!

La krima celo ĉu de Konfucio aŭ de Lin Biaŭ, kiuj tiel freneze propagandis geniismon de “ĉionscio denaska”, estis ĝuste tio, kiel malkovrite de la grandaj revoluciaj instruantoj Marks kaj Engels, ke **“fine oni venis al la konkludo ke la regadon devas**

plenumi la nobeloj, la sanktuloj kaj la saĝuloj”.

Konfucio propagandis ideisman transcendentalismon por defendi la reakcian diktaturon de sklavposedanta klaso. Kaj Lin Biaŭ propagandis la teorian programon kontraŭ-partian de geniismo por demonstri, ke li naskiĝis kiel destinita reganto, por ke li povu uzurpi la potencon de la Partio kaj la ŝtato kaj restarigu la kapitalismon.

## “NE ŜANĜEBLA ESTAS NUR TIO KE SUPERULOJ ESTAS SAĜAJ KAJ MAL- SUPERULOJ STULTAJ”

Tiu ĉi eldiro troviĝis ankaŭ en la libro *Lun Ju*.

La t.n. “saĝaj superuloj”, per kiuj Konfucio nomis la sklavposedantojn-nobelojn, kruele subpremis la sklavojn. Tiaj homoj, kiel Konfucio blufis, estis noblaj, saĝaj kaj superaj geniuloj, dum la vasta sklavaro kaj laborularo estas “stultaj malsuperuloj”, kiuj, laŭ li, estis malnoblaj, malsaĝaj kaj malsuperaj sklavoj. En la koncepto de Konfucio, la nobeloj denaske devas regi super la laboruloj, kaj la vasta laborularo laŭdestine devas esti regata, sklavigita kaj servi kiel brutoj, kaj ĉio ĉi tio estas antaŭdestinita kaj “ne ŝanĝebla”, kiel Konfucio asertis.

La renegato kaj naciperfidulo Lin Biaŭ prenis tiun absurdan tezon kiel armilon por freneze ataki la diktaturon de la proletaro. Li kalumniis, ke la laboruloj tuttage pensas nur “kiel akiri monon kaj rizon” kaj “pri oleo, salo, saŭco, vinagro kaj brulligno, pri siaj edzino kaj infanoj”, kaj ke la laboruloj estas “malsaĝaj kaj sensciaj” “malatentemuloj”. Lia kalumniado kontraŭ la laboruloj estas tre malica.

Sed, “la plebaj estas la plej saĝaj! la aristokrataj estas la plej stultaj”. Tiuj historiaj ideistoj Konfucio, Lin Biaŭ kaj similuloj, kiuj sin titolis per “sanktuloj” kaj “geniuloj”, estas ja veraj stultaj reakciuloj. Ili vane volis malebligi al la popolo ekkoni kaj reformi la mondon por ke ili povu libere sklavigi kaj disponi ĝin. Sed ilia intenco estas neniam efektivebla.

**“LA SUPERAJ ZORGAS PRI VIRTOJ;  
LA MALSUPERAJ — PRI TERKULTURO.  
LA SUPERAJ ZORGAS PRI JURO;  
LA MALSUPERAJ — PRI FAVORAĴOJ.”**

Tiu eldiro de Konfucio ankaŭ troviĝas en la libro *Lun Ju*. “La superaj” aludas sklavposedantojn-nobelojn kaj iliajn proparolantojn; “la malsuperaj” aludas la sklavojn kaj la laborulojn sklave truditajn per laborservoj. Per tio Konfucio diris ke la nobelaj regantoj zorgas moralon, dum

la plebaj laboruloj zorgas teron kaj grenkulturon, kaj ke la regantoj zorgas la tenadon de registemo, dum la laboruloj zorgas malgrandajn favoraĵojn. Tio estis nenio alia ol kalumniado al la laboruloj kaj senhonta honorigo al la sklavposedantoj.



Kaj la kolportaĵo de Lin Biaŭ estis ankaŭ tio sama. Li diraĉis, ke la kapo de laboruloj estas plenigita nur per “gratuloj pro riĉigo”, “akiro de riĉaĵo kaj trezoro” k.s. Kaj li memposedas, kiel li pretendis, kapon malsaman ol tiu de la laboristoj kaj kamparanoj, kaj ke lia penso longe distancas de tiu de la laboranta popolo kiel la ĉielo de la tero.

Lin Biaŭ arogante provis pruvi per tia absurdaĵo, ke la laboranta popolo devas esti regata de li kaj lia bando, kiuj titolis sin mem per “genioj donitaj de la naturo” kaj “talentuloj por ampleksi la tuton”. Tio kompreneble estas nur sonĝo dum sunluma tago.



Helpo al

Kunlernanto







## Ĉinaj Naciecoj

# Jaŭ-nacieco

**N**IA jaŭ-nacieco havas pli ol 700,000 membrojn, el kiuj pli ol duono loĝas en la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono kaj la ceteraj en la provincoj Hunan, Junnan, Guangdong kaj Gujĝoŭ.

En Kin- kaj Han-dinastioj (221 a.K.-189 p.K.) la praavoj de la jaŭ-nacieco jam vivis en la regionoj Ĉangŝa kaj Vuling en la suda kaj okcidenta partoj de Dongting-lago en la sudmeza Ĉinio. Dum sia vizito al Hianggiang-rivero la fama poeto Du Fu (712-770 p.K.) de Tang-dinastio verkis la verson “jaŭoj ĉasas sovaĝanserojn per lerta arkopafado”. En la longa historio la jaŭoj transloĝiĝis suden jaron post jaro, tiel ke ili dividis sin en multajn partojn kaj koncentre loĝis en montregionoj. Delonge la jaŭoj en plej multaj lokoj ĉefe okupiĝas pri agrikulturo kaj samtempe ankaŭ pri forstokulturado kaj kolektado de lokaj produktaĵoj, sed en malmultaj lokoj ili ĉefe okupiĝas pri forstokulturado kaj samtempe pri agrikulturo kaj flankaj okupoj. Ekzemple, tri kvaronoj da areo de la Gianghua-a Jaŭ-nacieca Aŭtonoma Gubernio en Hunan-provinco estas arbarregiono, tiel ke ĝi estas renoma kiel “ĉefproduktejo de cedro”, kaj servas kiel unu el la gravaj ligno-provizaj bazlokoj de la lando. La lokoj loĝataj de jaŭoj ĉefe produktas rizon, maizon, bataton, cedron, aleŭriton, olekamelion kaj bambuson. Krome iuj lokoj ankoraŭ abunde produktas fenugrekon, fungon, mielon, sekigitajn bambuĝermojn, ĉinan poligonaton kaj aliajn.

Jaŭ-nacieco havas sian lingvon. Pro longtempa interkontaktiĝo kun han-oj kaj ĝuang-oj, multaj el ili povas paroli en la hana aŭ ĝuang-a lingvo kaj skribi per hana lingvo. La jaŭoj ŝatas kanti. La kantteksto improvize verkita havas riĉan enhavon kaj ofte konsistas el kvar versoj kiel unu serio, el kiuj ĉiu havas sep ideografiaĵojn. En la movado de kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio multaj komunumoj de Ginhiu-a Jaŭ-nacieca Aŭ-

tonoma Gubernio en Guanghi okazigis kantkunvenojn por kritiki Lin Biaŭ kaj Konfucion. Jen ili kantas:

*Sur altaj jaŭ-aj montoj ŝvebas batala sono,  
Kie la malriĉkampanoj kaj mezkampanoj  
La malsuperaj, per buŝa kaj skriba artikoloj,  
Kritikas Lin Biaŭ, Konfucion kun giganta volo.*

En multaj lokoj jaŭoj emas amuzi sin per “longtambura danco” kaj ĝiaj melodioj prilaboritaj de muzikistoj jam fariĝis vaste bonvenigataj.

Antaŭ la Liberiĝo multaj lokoj loĝataj de la jaŭoj troviĝis en etapo de feŭda bienula ekonomio kaj malmultaj ankoraŭ en primitiva posedsistemo. La montposedantoj, kiuj havis grandan arbaran areon, luigis siajn montajn agrojn al nenion havantaj montanoj kondiĉe ke la lastaj krom pago de terrento ankoraŭ devas arbarumi la montojn. Kiam la arbidoj fariĝis grandaj arboj, tiuj arboj kune kun la luitaj agroj estis redonitaj al la montposedantoj. Tia ekspluata metodo estis nomata “redono de montoj kun arboj”. Tio ne nur kaŭzis mizerecon al la jaŭ-naciecaj laboruloj, sed ankaŭ devigis ilin ĉiam vivi migrantan vivon en la pasinteco.

Por oponi kontraŭ la reakcia regado kaj nacia subpremado fare de la reakciaj regantaj klasoj en diversaj dinastioj, la jaŭ-naciecaj popolanoj faris multfoje armitajn batalojn. La relative famaj el ili en la historio estis la insurekcioj en Datenghia-regiono de Guanghi en Ming-dinastio (1368-1644) kaj en Gianghua de Hunan en King-dinastio (1644-1911). En la lasta jarcento la jaŭoj aktive partoprenis en la revolucia movado de la Tajping-a Ĉiela Regno. Antaŭ ol fari la insurekcion en la vilaĝo Gintian, Hong Hiukjuan, gvidanto de la Tajping-a Ĉiela Regno, longtempe aktivadis en Zigingŝan-regiono mikse loĝata de jaŭoj kaj ĝuang-oj, tial multaj jaŭoj aliĝis al la organizo de li gvidata. La kampana revolucia movado

ne nur forte batis reakciajn feŭdajn regantojn kaj la agresajn fortojn de fremda kapitalismo, sed ankaŭ faris revolucion balaadon al la putra feŭda ideologio kaj kulturo kaj ĝia spirita apogilo — la doktrino de Konfucio kaj Mencio. Ĝis nun ankoraŭ troviĝas la historiaj restaĵoj lasitaj de jaŭoj pri la revolucia movado de la Tajping-a Ĉiela Regno en Longping-vilaĝo de Luohiang-distrikto de Ginhiu-a Jaŭ-nacieca Aŭtonoma Gubernio en Guanghi.

Post la naskiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio la revolucia batalo de la jaŭ-naciecaj popolanoj eniris novan etapon. En la jaro 1926 la Unua Kongreso de Kamparanaj Rezentantoj de Hunan-provinco kunvokita sub la gvido de Prezidanto Maŭ faris rezolucion pri la liberiga batalo de jaŭoj, kio montris direkton al la batalo de la jaŭ-naciecaj popolanoj. Dum la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito, Hiŝan-distrikto koncentre loĝata de jaŭoj en Bama-gubernio de Guanghi estis la ĉefa parto de la Joŭgiang-a revolucia bazloko gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio. Post kiam la Sepa Armeo de la Ruĝa Armeo ekmarŝis norden por rezisti kontraŭ la japanaj agresantoj, la tieaj jaŭoj persistadis en la batalo ĝis la Liberiĝo de 1949.

Post la Liberiĝo, sub la brilo de la nacia politiko de Prezidanto Maŭ kaj la Partio, la jaŭ-aj kaj alinaciecaj popolanoj akiris liberiĝon kaj rajton pri nacia egaleco. Post demokratia reformo en jaŭ-aj regionoj la feŭda bienula klaso estis faligita kaj la jaŭoj fariĝis mastroj de la ŝtato laŭ la politiko de Prezidanto Maŭ kaj la Partio pri nacia regiona

aŭtonomigo. Nun jam stariĝis sep jaŭ-naciecaj aŭtonomaj gubernioj Ginhiu, Du-an kaj Bama en Guanghi, Liannan kaj Ĵujan en Guangdong, Gianghua en Hunan kaj Hekoŭ en Junnan kaj kvar unuiĝintaj aŭtonomaj gubernioj de kelkaj naciecoj inkluzive de jaŭ-nacieco kiaj Longŝeng, Donghing, Longlin en Guanghi kaj Lianŝan en Guangdong. La nombro de nacimalplimultaj kadroj rapide kreskas kaj ili laboras en diversnivelaĵ gvidaj postenoj de la partia kaj registara oficejoj. Pan Mejjing (jaŭo), sekretariino de la partia filio de Huangŝi-brigado en Hehian-gubernio de Guanghi estis elektita kiel alterna membro de la Centra Komitato en la Deka Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio.

Direktate de la revolucia linio kaj nacia politiko de Prezidanto Maŭ efektiviĝis en la regiono de jaŭoj la demokratia reformo, agrikultura kooperigo kaj komunumigo. Precipe post la Granda Proleta Kultura Revolucio okazis granda ŝanĝiĝo al tiu malriĉa postiĝinta regiono dank' al pena konstruado de la jaŭ-oj en disvolvo de la spirito **“lukti en mal-faciloj”**, **“sinapogi sur la propraj fortoj”** kaj de la amasa movado **“lerni de Daking en industrio”** kaj **“lerni de Daĝaj en agrikulturo”**. Ni prenu la Ginhiu-an Jaŭ-naciecan Aŭtonoman Gubernion kiel ekzemplon. Tie estas multaj altaj montoj kaj la trafiko estis en fermiteco. Antaŭe ĝi havis nur postiĝintan agrikulturon kaj preskaŭ nenan industrion. Nun en la gubernio jam fondiĝis pli ol 200 hidroelektrejoj kaj fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj, kemio, cemento, papero, ligno kaj aliaj. La globmuelilo, generatoro, dispecigilo, senŝeligilo kaj rizplantilo produktitaj de la fabriko de agri-



*Jaŭ-naciecaj elementaj lernantoj de Guanghi-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono en leciono*



kulturaj maŝinoj multe akcelis disvolvon de la loka agrikulturo. En Gianghua-a Jaŭ-nacieca Aŭtonoma Gubernio de Hunan-provinco la arbohakado estas jam mekanikigita aŭ duonmekanikigita kaj la forstumita areo jam atingis pli ol 9,333 hektarojn, tiel ke la produktokvanto de ligno kreskis ĉiujare kaj per tio ili faris sian kontribuon al la socialisma konstruado de la lando.

La Du-an-a Jaŭ-nacieca Aŭtonoma Gubernio estas avangarda unuo en lernado de Daĝaj en agrikulturo en Guanghi. La loko estas ŝtonoza montregiono kaj havas pli ol 20,000 ebenajn terpecojn respektive ĉirkaŭatajn de montoj. La naturaj kondiĉoj tie estas malbonaj. Pro tio la agroj ofte suferis de sekegeco, se ne pluvis nur duonmonaton; male, se la pluvkvanto estis tro abunda, do la akvo torentis de sur montoj kaj la ebenaj terpecoj tuj fariĝis laĝetoj. Sed, kun la heroa spirito "homoj certe venkos la naturon" kaj la batalvolo "Malsaĝa Avo povas translokigi la monton", la jaŭoj energie faris akvoutiligan

konstruadon kune kun alinaciecaj popolanoj en la tuta gubernio. Ĝis la fino de 1973 ili konstruis pli ol 20,000 grandajn kaj malgrandajn akvorezervejojn kaj laĝetojn, 111 tunelojn, 340 riverbaraĵojn kaj drenajn kaj irigaciajn kanalojn trunkajn kaj branĉajn kun totala longeco de pli ol 1,100 kilometroj, kaj ekspluatis al utiligado 187 subterajn riverojn. Ĉio ĉi tio fundamente forigis la minacon de sekegeco kaj inundo al agroj kaj kreis favorajn kondiĉojn por disvolvi la agrikulturan produkton. En 1973 la produktokvanto de greno de la gubernio duobligis tiun antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio. En la lastaj ses jaroj ĝi liveris al la ŝtato 60,000 tunojn da greno kaj 240,000 porkojn kaj ŝafojn.

Nun, sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, la jaŭ-naciecaj popolanoj kontinue faras profundan kritikon al Lin Biaŭ kaj Konfucio kune kun la tutlanda popolo kaj klopodas por akiri pli grandajn venkojn sur la socialisma vojo.

## Grava sciigo

Ni sciigas ke nia ŝtata entrepreno por eksporti ĉinajn eldonaĵojn GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj) jam starigis Esperantan Sekcion por pli efika distribuado kaj disvendo de ĉinaj eldonaĵoj en Esperanto, inkluzive nian gazeton EL POPOLA ĈINIO, tra la tuta mondo. Rezulte de tiu aranĝo, la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo ĉesis funkcii je la 30-a de junio 1974 kaj transdonis ĉiujn siajn laborojn kaj rilatiĝojn inkluzive ĉiujn kontojn al la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN, kiu uzas daŭre ankaŭ la saman poŝtkeston de LS de ĈEL (P.O. Kesto 313, Pekino).

LS de ĈEL elkore dankas ĉiujn, kiuj dum multaj jaroj helpis ĝin per abonoj, abonigoj, perado ktp, esperante ke ili estontece ankaŭ kun sama bonvolo kunlaboros kun la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN

por ke la amika kunlaboro povu daŭri fruktodone kaj alportu pli grandan disvastigon de niaj eldonaĵoj inter la esperantistoj de la mondo.

Oni bonvolu noti, ke de nun pri ĉio ili turnu sin al Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN anstataŭ al LS de ĈEL, en okazo de abono, adresŝanĝo, peto de specimeno kaj informoj pri ĉinaj Esperantaj eldonaĵoj, sendo de pagoj ktp. Por sendi monon tra banko al la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN oni enpagu al: A/C GUOZI SHUDIAN, 111 Cannon street, London, EC4N 5AS, Anglio, (en sterlingo) kun la rimarkigo: *por Esperanta Sekcio.*

Ni estas ĉiam servpretaj.

**Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo**

**Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN  
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio**



## Ĉina Geografio

# La ĉinaj basenoj

**E**N Ĉinio troviĝas multaj basenoj, inter kiuj la grandaj ĉiuj dislokiĝas en ĝia okcidenta parto, dum la mezgrandaj kaj malgrandaj ĉefe en ĝia orienta parto. Nun ni prezentu kelkajn fame konatajn basenojn el ili.

### TARIM-BASENO

Tianshan-montaro en la okcidenta parto de Ĉinio dividas la Hingiang-an Ujguran Aŭtonoman Regionon en du partojn: Tarim-baseno sude kaj Ĝungar-baseno norde. Antaŭ ĉ. kvincent milionoj da jaroj en Hingiang estis nur du grandaj terpecoj — Tarim kaj Ĝungar, kaj la cetera regiono estis vasta maro. Post ĉ. 200-300 milionoj da jaroj en la vasta regiono de la okcidenta parto de Ĉinio okazis forta tertavola movado. Pro tio la marfundo emergis kiel tero kaj poste leviĝis kiel altaj montoj. La vasta maro malaperis, kaj Tarim kaj Ĝungar, insuloj origine ĉirkaŭitaj de la maro, fariĝis basenoj ĉirkaŭataj de la altaj montoj.

Tarim-baseno tuŝas Pamir-altebenajon en la okcidento kaj estas ĉirkaŭata de Kunlun-montaro, Karakoram-montaro kaj Altin-montaro en la sudo kaj oriento. Kun areo de ĉirkaŭ 500,000 kvadrataj kilometroj ĝi estas unu el la plej grandaj landinternaj basenoj en la mondo. Tie fluas Tarim-rivero, la plej longa landinterna rivero de Ĉinio. En ĝia oriento kuŝas Lobnor-lago, la plej granda vaganta lago de Ĉinio. Kaj en ĝia meza parto troviĝas



Taklamakan-dezerto kun areo de pli ol 300,000 kvadrataj kilometroj, kiu estas unu el la plej grandaj dezertoj de la mondo. Oaza zono ĉirkaŭ la dezerto kun reto da vojetoj kaj kanaloj, fekunda grundo kaj oportuna irigacio estas agrikulturejo produktanta tritikon, maizon kaj rizon, kaj estas ankaŭ unu el la kotonproduktejoj de Ĉinio, kies kotono estas longfibra kaj bonkvalita. En ĝia sudo oni havas longan historion de bredado de silkraŭpo. Krome, la oazo abunde produktas ankaŭ abrikoton, piron kaj pomon.

Situante profunde en la centro de la azia kontinento, Tarim-baseno estas unu el la regionoj plej malproksimaj de oceanoj en la mondo. Ĉirkaŭaj altaj montoj de la baseno baras la penetradon de humida aerfluo de oceanoj, tial la klimato tie estas seka kaj pluvus malmulte. En la meza parto de la baseno la jara pluvokvanto estas nur ĉirkaŭ 10 milimetroj. Granda diferenco troviĝas tie en la temperaturo inter tago kaj nokto, kaj inter sezonoj, nome, 50°—60°C inter vintro kaj somero, kaj ĉirkaŭ 15°—20°C inter tago kaj nokto. “En pelt’ matene kaj en gaz’ tagmeze oni sin ja vestas; manĝante akvomelonon ĉirkaŭ forno oni ofte restas.” Jen la popoldiro pri granda ŝanĝiĝo de la temperaturo dum tagnokto inter printempo kaj somero, kaj inter aŭtuno kaj vintro. La riveroj de la baseno ĉefe trovas sian fonton en neĝakvo de altaj montoj kaj malaperas en la dezerto. De longtempe, por venki se-





*Riĉa rikolto de tritiko sur ebenaĵo okcidente de Siĉuan-provinco*



*Riĉa rikolto de hami-melono en Hingiang*

kecon la tieaj laborantaj popolanoj fosis multe da putoj kun subteraj kanaloj por irigacii kampojn per subtera akvo. Post la Liberiĝo, en la dezerta regiono oni plantis arbojn, faris akvoutiligan konstruadon kaj forportis sablon por krei kultureblajn kampojn. Ekzemple, post okjara peniga batalo la popolanoj de Piŝan-gubernio konstruis kanalojn kun longeco de 229 kilometroj en Gobio kaj dezerto, por konduki neĝakvon de Kunlun-montaro en la sablan regionon kaj plantis pli ol 1,500 hektarojn da arboj kaj arbarajn zonojn kun longeco de pli ol 1,000 kilometroj. En multaj lokoj sub la pro-

tektado de vicoj da arbaraj zonoj oni ne nur rekonstruis agrikulturajn kampojn dronigitajn en sablon, sed ankaŭ kulturebligis grandajn terpecojn en la dezerto.

En Tarim-baseno nove konstruitaj ŝoseoj kunligis urbojn kaj vilaĝojn. Tra la dezerto de Gobio iras multaj trunkaj linioj inter kiuj Hingiang-Tibeta Ŝoseo estas la plej grava.

## ĜUNGAR-BASENO

Ĝungar-baseno situanta inter Tianŝan- kaj Altaj-montaroj estas stepo escepte de dezerto en parto de ĝia mezo.

Ĉar topografie la baseno kliniĝas nordokcidenten kaj la nordokcidenta aerfluo povas penetri en la basenon, tial tie la pluvokvanto estas pli multa per 150-300 milimetroj ĉiujare meznombro ol tiu en Tarim-baseno, tamen ĝia temperaturo estas pli frosta ol tiu de la lasta. Relative malmultaj riveroj troviĝas tie. Irtiŝ-rivero fluanta laŭ la piedoj de Altaj-montaro en Sovetunio estas unika rivero de Ĉinio, kiu fluas en la Arktan Oceanon. Sub la baseno abunde kuŝas riĉfontoj de petrolo, karbo kaj metaloj. Karamai en la okcidenta parto de la baseno estas unu el la kompare grandaj petrolkampoj de Ĉinio. De antikveco, Altaj-montaro interne de Ĉinio estas fame konata pro abunda produkto de oro. Urumĉi situanta en la suda parto de la baseno estas ĉefurbo de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj ankaŭ nova industria urbo en la nordokcidento de Ĉinio. En la lastaj jaroj, en la baseno de Manas-rivero oni starigis multajn grandajn ŝtatajn kultivejojn kaj multaj dezertaj kampoj fariĝis kultureblaj. Tie oni akiris sinsekvajn abundajn rikoltojn de tritiko kaj kotonono. Vinberoj kaj Hami-melonoj estas la lokaj specialaj produktaĵoj. Ĝungar, antaŭe rigardata kiel loko, kie oni ne povis planti kotonon, nun fariĝis nova kotonregiono kun latitudo la plej alta en nia lando.

Antaŭ la Liberiĝo, en Ĝungar-baseno troviĝis neniu fervojo. Nun, la fervojo de Pekino ĝis Urumĉi antaŭlonge jam ekfunkciis. Ŝoseoj ligas urbojn kun minejoj kaj agrikulturaj regionoj.

## CAJDAM-BASENO

Cajdam-baseno situas en la nordokcidenta parto de Kinghaj-provinco, en ĝiaj nordo kaj nordoriento estas Kilian-montaro, en ĝia sudo Kunlun-montaro kaj en ĝia nordokcidento Altin-montaro. Ĝi estas

fermita baseno sur landinterna altebenaĵo. En la baseno troviĝas multaj dezertoj, inter kiuj dislokiĝas stepoj kaj malaltaj malsekaj marĉoj.

“Cajdam” en la mongola lingvo signifas “salan marĉon”. Antaŭ 200-300 milionoj da jaroj, la baseno estis granda lago. Poste rezulte de iompost-ioma malgrandiĝo de surfaco de la lago restis multaj salaj lagoj. Ĉarhan-sallago kun areo de 1,600 kvadrataj kilometroj en centro de la baseno konservas 25,000 milionojn da tunoj da salo kaj ĝia saltavolo dikas je 15 metroj. Sur la surfaco de la sallago formiĝis malmola salkovraĵo, sur kiu oni povas konstrui fabriksdomojn. Multaj domoj en Cajdam estas konstruitaj el salaj pecegoj. Ankaŭ ŝoseo liganta nordon kun sudo de la baseno trairas la salkovraĵon. Tie troviĝas ankaŭ salaj kristaloj kun diversaj koloroj kaj formoj. El la kristala salo oni povas skulpti diversajn artaĵojn.

Krom salo Cajdam-baseno produktas ankaŭ karbon, petrolon, asbeston kaj diversajn metalajn minaĵojn. Nun, en la baseno jam estas establita industrio de ferŝtalo, karbo, neferaĵoj, petrolo k.a. per tio Cajdam-baseno fariĝis nova industria regiono de la nordokcidento de Ĉinio.

## SICŬAN-BASENO

Siĉuan-baseno situas en la supra baseno de Jangzi-rivero, en ĝia okcidento estas Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo, en ĝia sudo Junnan-Gujĝoŭ-a Altebenaĵo kaj en ĝiaj oriento kaj nordo montaroj Vuŝan kaj Daba. En la mezo de la baseno troviĝas malaltaj montoj, montetoj kaj ebenaĵoj, el kiuj la plej granda estas Ĉengdu-ebenaĵo en ĝia okcidenta parto.

Antaŭ ĉirkaŭ 135 milionoj da jaroj, ankaŭ Siĉuan-baseno estis vasta lago. Poste la ĉirkaŭa tero de la lago leviĝis kaj fariĝis altaj montoj, kaj en la orienta rando de la baseno aperis breĉo, kiu estas nunaj Tri Montgorĝoj de Jangzi-rivero, kaj tra kiu elfluis akvo de la lago. Tiamaniere tie for-


miĝis kontinento. Nun oni ankoraŭ povas elĉerpi salakvon el putoj fositaj en la fundo de la baseno.

La natura pejzaĝo de Siĉuan-baseno diferencas de tiu de la supre menciitaj basenoj. Ĉar malvarma aero fluo estas barata de altaj montaroj en ĝia nordo, tial la baseno havas varmegan someron kaj mildan vintron. Tie vegetaĵoj estas ĉiam verdaj, vintre multas nebuloj kaj abundas pluvo. En la baseno troviĝas multaj riveroj, kiuj enfluas en Jangzi-riveron. Antaŭ pli ol du mil jaroj, la laboranta popolo jam konstruis sur Ĉengdu-ebenaĵo la fame konatan akvoreguligan konstruaĵon Dugiang-janbaraĵon. Post la Liberiĝo dank’ al la plibonigo de irigacia sistemo, la irigaciata areo plivastiĝis de 150 mil hektaroj antaŭ la Liberiĝo ĝis 450 mil hektaroj.

Tie multe kreskas subtropikaj vegetaĵoj. Ĝi estas ne nur grava rizprodukta regiono de Ĉinio, sed ankaŭ produkta regiono de sukerkano, silko, teo, drogherboj kaj fruktoj kaj pro tio ĝi estas de longe konata kiel “ĉiela lando”.

Subtere de Siĉuan-baseno abunde troviĝas karbo, petrolo, natura gaso, salo kaj aliaj mineraloj. Antaŭ la Liberiĝo, tie estis postĝintaj industrioj kaj malfacilaj trafikoj. Post la Liberiĝo, tie rapide disvolviĝis industrioj de fero, ŝtalo, maŝinfabriko, kemio, konstruaj materialoj kaj multaj malpezaj industrioj kaj konstruiĝis norde la Baŭgi-Ĉengdu-a Fervojo kaj sude la Ĉengdu-Gujĝoŭ-a Fervojo. En la Granda Proleta Kultura Revolucio oni konstruis la Ĉengdu-Kunming-an Fervojon, kiu ligas la provincojn Junnan, Gujĝoŭ kaj Siĉuan. La fervojo ne nur mallongigis veturan tempon de sudokcidenta landlimo ĝis diversaj lokoj de la patrolando, sed ankaŭ donis favorajn kondiĉojn por disvolvi industrian kaj agrikulturan produktadon en la sudokcidento de Ĉinio. En la baseno ŝoseoj interkruciĝas, surakva transporto prosperas, kaj grandaj vaporŝipoj povas veturi tra la Tri Montgorĝoj de Jangzi-rivero al urboj Vuhan kaj Ŝanhajo. Nun Siĉuan-baseno fariĝis grava industria bazo de la sudokcidenta parto de Ĉinio.

*Sur petrolkampo de Cajdam-baseno de Kinghaj-provinco*





*Sur la Kovrilo:*

Mararmeano kaj infanoj

*Sur la Dorskovrilo:*

Novaj domoj ĉe Liuhua-ponto  
en Kantono



# EL POPOLA ĈINIO 中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO  
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

---

**N-ro 8 (193) 1974**

---

## Ĉefa Enhavo

Nova disvolviĝo de la ekstera komerco de Ĉinio . . . . .	1
Pri la foiro de ĉinaj eksportaj varoj en printempo 1974 . . . . .	6
Hingang — komerca haveno de amikeco . . . . .	11
Ekspluato de Dagang-petrolkampo . . . . .	15
Heroinoj venis al la postfronto . . . . .	20
La japana esperanto-delegacio en Ĉinio . . . . .	25
Batalo ĉe Hiŝa-insularo (Raporto en versoj) . . . . .	29
Intima rilato inter la armeo kaj popolo sur Songhua-rivero . . . . .	32
Abundaj fruktoj de la eduka revolucio . . . . .	34
Vizito al heroaj vilaĝoj ĉe Bajjangdian-lago . . . . .	37
“Geniismo” — ĉarlatana trompaĵo . . . . .	42
Kritiko pri la reakcia tezo de Konfucio kaj Lin Biaŭ ke “Superuloj estas saĝaj kaj malsuperuloj stultaj” . . . . .	44
“Antaŭdestinismo” estas spirita hommortiga glavo . . . . .	46
Jaŭ-nacieco . . . . .	50
Grava sciigo . . . . .	52
La ĉinaj basenoj . . . . .	53



Al pafekzerco

# Urbaj Milicanoj en Intensa Milita Trejnado

Fotitaj de JANG ĈANGGONG kaj HING HUAKI



Puŝate de la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la milicanoj de Huabej-a Medikamenta Fabriko vigle kaj serioze trejnas sin, plene ludas la pioniran kaj sturman rolon en diversaj laboroj kaj faris novan kontribuon por protekti la socian ordon kaj solidigi la proletan diktaturon. En multfojaj pafadoj, lastatempe, ĉiuj subplotonoj de la kompanio de kontraŭaviadila artilerio gajnis bonegan sukceson, kaj ankaŭ pli ol 70% de milicanoj de la fabriko akiris bonegan sukceson en pafado per malpezaj armiloj. Pro

tio, la fabriko estas elektita kiel elstara unuo de urbo Ŝigiaĝuang, kaj en tiuj aktivadoj aperis multaj modelaj milicanoj.

Sub la gvido de la partia komitato de la fabriko kaj helpo de tiea garnizona trupo, la milica trupo de la fabriko jam fariĝis fortika organizo tiel en milito kiel en produktado. Ili ĉiam estas singardemaj en defendo de urbo kaj produktado kaj estas ĉiam pretaj ekstermi ĉiujn aŭdace invadontajn malamikojn.



Milicanoj kritikis Lin Biaŭ kaj Konfucion por senĉese alinigi sian politikan konsejon.




Vicsekretario de la partia komitato de la fabriko Li Pejjan interparolas kun milicianoj.




Bajoneta ekzerco





La unua artileriano Liu Gengong




La dua artileriano Li Shuangchen



En trejnado





La kvara artileriano Ma Ŝuhua



Ŝargisto Jen Ŝenglin



Soldato instruas al milicianoj teknikon pri kontraŭaviadila kanonpafado.



Viŝado





Fajrestinga ekzerco en urbo



Disvolvi sportajn aktivadojn por plifortigi la sanon de la milicianoj



Sanitaristino (*ebura skulptaĵo*)



